


Joachim Giessner



## Internacia Fervoja Esperanto Federacio



## Historio

Kompletiga Suplemento  
pri la jaroj 1984 - 1999

12.04.1999

**Joachim Giessner**  
**Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**

# Historio

**Kompletiga Suplemento pri la jaroj 1984 – 1999**

**Joachim Giessner**

Daŭrigo de la IFEF-Historio  
eldonita 1999  
okaze de la 90jara jubileo  
de la fervojista Esperanto-Movado

# ENHAVO

Enkondukaj vortoj	4
Mallongigoj uzitaj en la Kompletiga Suplemento	5
I-a Sekcio Internacia Movado	7
11a Ĉapitro Periodo 1984 - 1999	7
12a Ĉapitro Funkciuloj de la Fervojista Movado	18
Estraranoj de 1984 ĝis 1999	18
Honoritoj flanke de IFEF, FISAIC kaj UEA	19
La nuna IFEF-prezidanto	17
13a Ĉapitro La internacia organo	20
14a Ĉapitro Fakaj Komisionoj kaj prelegoj	22
A Terminara komisiono (TK), ekde 1994 Faka Komisiono (Terminara Sekcio)	22
B Fakprelega Komisiono, ekde 1989 Fake Aplika Komisiono, ekde 1994 Fake Aplika Sekcio	25
15a Ĉapitro IFEF kaj FISAIC	27
La IFEF-Kongresoj ekde 1984 ĝis 1999	29
Ĉefaj fakaj prelegoj kaj ekskursoj 1984-1999	30
II-a Sekcio Landaj asocioj	32
Aŭstria Fervojista Esperanto-Asocio (AFEF)	32
Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA)	32
Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (BAEF)	32
Fervojista Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio (FSBEA)	33
Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (FS ĈEA)	33
Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA)	34
Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)	34
Estonio	35
Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj (ESFF)	35
Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA)	36
Fakgrupo Fervojistoj - Esperantistoj de Germana Regna Fervojo (FFE-DR)	36
Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA)	37
Hispana Esperanto Fervojista Asocio (HEFA)	39
Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA)	39
Itala Fervojista Esperanto-Asocio (IFEA)	40
Japana Esperantista Ligo Fervojista (JELF)	40
Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE)	40
Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA)	41
Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda (FERN)	41
Norvega Esperanta Fervojista Asocio (NEFA)	42
Landa Fervojista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio (FS-PEA)	42
Rumana Esperanto Fervojista Asocio (REFA)	43
Slovakia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj (SAFE)	44
Slovenio	45
Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF)	45
Bibliografio "Fervojfakaj Kajeroj" n-roj 1 ĝis 7	46
Organgramo pri la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio	48

## Enkondukaj vortoj

Tiu ĉi suplemento kompletigas la broŝuron *Historio de IFEF 1909 - 1984*. En 1999 la 90an fojon ripetiĝas la naskiĝdato de la fervojista movado. Tial ni aldonu ion el raportoj, protokoloj kaj dokumentoj de la pasintaj 15 jaroj.

Laŭeble ni sekvis la klasifikadon en la Historio-broŝuro, sed devis konsideri intertempajn ŝanĝojn.

Ofte ni devis mencii nomojn de funkciuloj, aŭtoroj, prelegintoj, sed ankaŭ ofte ni ne konis iliajn titolojn. Malĝustajn aŭ mankantajn titolojn ni bedaŭras.

La enhavo estas forte influita de la eventoj en Eŭropo, kiuj rilate al la okcidentaj fervojoj efikis jam en la 80aj jaroj. Sed la politikaj ŝanĝoj, kiuj de post 1989 skuis tutan Eŭropon, eĉ la mondon, ne povis ne tuŝi la Esperanto-movadon, sekve ankaŭ la fervojistajn asociojn. Paralele al ĝenerale pozitivaj ŝanĝoj montriĝis multe da negativaj sekvoj.

Unue la privatigo kaj disbatado de pli kaj pli da okcidentaj fervojoj kaŭzis rimarkindan membroperdon en la okcidentaj landaj asocioj. Poste la disfalo de Sovet-Unio kaj Jugoslavio kaŭzis ekeston de kelkaj novaj ŝtatoj, do landaj asocioj de IFEF. Sed en preskaŭ ĉiuj tiuj novaj l.a. malkreskis la membronombroj kaj al la restantaj membroj mankis mono.

En la dua duono de la 90aj jaroj la organizaj ŝanĝoj en la fervojoj progresis ankaŭ en la orientaj landoj kun ĉiuj jam priskribitaj konsekvencoj. La nombroj de IFEF-membroj kaj kongresanoj klare montras tion.

Fine mi dankas al ĉiuj landaj asocioj, kiuj kontribuis per taŭga materialo al tiu Suplemento. Precipe mi dankas al la prezidantino de la slovakia asocio, Magdaléna FEIFIČOVÁ, sen kies perkomputila helpo la Suplemento ne ekzistus Same sinceran dankon al prezidanto de la dana asocio, Henning HAUGE kaj al Sabine kaj Christian DARBELLAY (Germanio), kiuj transprenis la finlaboron, enpaĝigon kaj presadon.

Fine akompanu tiun Suplementon la deziro, ke IFEF kaj la tuta Fervojista Movado eltenu tiun komplikan tempon same kiel ĝi jam travivis militojn kaj diktatorajn reĝimojn.

*Joachim GIESSNER, Honora Prezidanto de IFEF*

## Mallongigoj uzitaj en la Kompletiga Suplemento

AFEF	Aŭstria Fervojista Esperanto-Asocio
AT	Aŭstrio
BAEF	Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj
BE	Belgio
BEFA	Belga Esperanto Fervojista Asocio
BG	Bulgario
CFR	Rumanaj Ŝtataj Fervojoj
CH	Svisio
CLE	Centra Laborrondo Esperanto
CS	Ĉeĥoslovakio
ĈD	Ĉeĥaj Fervojoj
ĈEL	Ĉina Esperanto Ligo
ĈFEA	Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio
ĈSD	Ĉeĥoslovakaj Fervojoj
ĈSFR	Ĉeĥoslovakia Federacia Respubliko
DB	Deutsche Bundesbahn
DB AG	Deutsche Bahn Aktiengesellschaft
DE	Germanio
DEFA	Dana Esperantista Fervojista Asocio
DK	Danio
DR	Germana Regna Fervojo
EE	Estonio
ES	Hispanio
ESFF	Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj
FAK	Fake Aplika Komisiono
FAS	Fake Aplika Sekcio
FERN	Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda
FFEA	Franca Fervojista Esperanto-Asocio
FFE-DR	Fakgrupo Fervojistaj Esperantistoj de Germana Regna Fervojo
FI	Finnlando
FISAIC	Internacia Federacio de Kulturflegantaj Fervojistoj
FK	Faka Komisiono
FN	Fervojistaj Novaĵoj
FR	Francio
FRG	Federacia Respubliko Germanio
FS BEA	Fervojista Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio
FS ĈEA	Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
FS-PEA	Landa Fervojista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio
FS SEA	Fervojista Sekcio de Slovacia Esperanto-Asocio
GDR	Germana Demokrata Respubliko
GEFA	Germana Esperanta Fervojista Asocio
HEA	Hungara Esperanto-Asocio

HEFA	Hispana Esperanto Fervoĵista Asocio
HFEA	Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio
HR	Kroatio
HU	Hungario
HŽ	Kroataj Fervoĵoj
ICE	Inter City Express
IF	Internacia Fervoĵisto
IFEA	Itala Fervoĵista Esperanto-Asocio
IFEF	Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio
IFES	Internacia Fervoĵista Esperanto-Skisemajno
IFK	Internacia Fervoĵista Kongreso
IT	Italio
JAFE	Jugoslavia Asocio de Fervoĵistoj Esperantistoj
JELF	Japana Esperantista Ligo Fervoĵista
KFEA	Kroata Fervoĵista Esperanto-Asocio
LG IV	Lexique Général des Termes Ferroviaires de UIC (4a eldono)
LKK	Loka Kongresa Komitato
LU	Luksemburgio
MÁV	Hungaraj Ŝtataj Fervoĵoj
NEFA	Norvega Esperanta Fervoĵista Asocio
NL	Nederlando
NO	Norvegio
PKP	Pola Ŝtata Fervoĵo
PL	Pollando
REFA	Rumana Esperanto Fervoĵista Asocio
RO	Rumanio
SAEF	Svisa Asocio de Esperanto-Fervoĵistoj
SAFE	Slovakia Asocio de Fervoĵistoj-Esperantistoj
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
SE	Svedio
SK	Slovakio
SI	Slovenio
TeKu	Terminara Kuriero
TGV	
TK	Terminara Komisiono
TS	Terminara Sekcio
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UFEG	Unuiĝo de Fervoĵistaj Esperanto-Grupoj (en Ĉinio)
UIC	Union Internationale des Chemins de Fer
UK	Universala Kongreso de Esperanto
YU	Jugoslavio
ZEO	Zamenhof-Esperanto-Objekto
ŽSR	Fervoĵoj de Slovaka Respubliko

## I-a Sekcio - Internacia Movado

### 11-a Ĉapitro - Periodo 1984 - 1999

#### 1984

La 25a IFES estis aranĝita en Maria Alm (AT) kun 80 partoprenantoj el 8 landoj, Ĝojiga nombro, neniam poste denove atingota.

Post intensivaj klopodoj IFEF atingis pere de sia prezidanto, ke la bulgara l. a. fariĝis membro de FISAIC. Tiel eblis, ke la 36a IFK en Slanĉev Brjag ĉe Burgas (BG) povis okazi sub aŭspicioj de FISAIC. Ties ĝenerala prezidanto Gilbert SCHMIT (LU) varme salutis la kongreson. LKK povis bonvenigi 865 kongresanojn el 23 landoj. Aperis 4 kongresbultenoj kun detalaj informoj. Memorarbo estis plantita. La publika eĥo estis eksterordinare granda. La ministro por transporto patronis la kongreson kaj persone salutis en la inaŭguro.

En IF 1984.3 estis publikigita ampleksa *Tabelo pri la laborkondiĉoj de fervojistoj en 18 landoj* laŭ stato de 1982. Tio estis rezulto de enketo de IFEF ĉe la l. a. Ĝi trovis atenton de sindikatoj, ekzemple la svisa publikigis la tutan materialon en germana lingvo.

En oktobro 1984 la IFEF-prezidanto Joachim GIESSNER ricevis la Meritkrucon de la Federacia Respubliko Germanio pro sia popolojn liganta agado.

En la kontaktkunveno dum la UK en Vancouver partoprenis 15 personoj el 10 landoj.

Ĉar antaŭ apero de la Historio ne konata, ni jen informas, ke la 23an de julio 1983 mortis unu el la plej konataj kaj ŝatataj funkciuloj de IFEF, la prezidanto de la brita l. a. Horace BARKS.

#### 1985

La 26a IFES okazis en Morzine (FR) kun 78 partoprenantoj.

La membronombro estis 2.300 en 20 landoj. La FISAIC-prezidanto SCHMIT fariĝis membro de Honora Patrona Komitato fondita de UEA por la jubilea jaro 1987. La *IFEF-Historio pri la jaroj 1909 - 1984* estis senpage donita al ĉiu membro. Vicprezidanto GULYÁS denove estis elektita por 3 jaroj UEA-komitatano A kiel reprezentanto de IFEF.

Prezidanto GIESSNER estis LKK-membro de UK Augsburg kaj gvidis la nacian vesperon. En la fervojista kontaktkunveno de tiu UK partoprenis 67 personoj el 17 landoj. Aldoniĝis trajnekskurso al la trafikmuzeo en Nürnberg. Kiel jam en UK-oj Mainz kaj Hamburg ankaŭ en Augsburg GEFA atingis, ke la Federacia Fervojo starigis giĉeton en la kongresejo. Pli ol 2.000 informoj estis donitaj, centoj da biletoj kaj lokrezervoj venditaj.

Por povi financi la planotan eldonon de terminaro, en la 37a IFK Vejle (DK) laŭ kongrespropono estis fiksita, ke el ĉiu normala jarbudĝeto estos prenata po unu dana krono je membro por krei Terminaran Fonduson, kiu kompreneble ankaŭ akceptis donacojn. Pri ĝia stato aperadis desegnaĵoj en IF en formo de termometro.

Problemo daŭre pli kaj pli akriĝanta estis la manko de junuloj. Esceptoj estis konstateblaj nur en kelkaj orienteŭropaj landoj.

Gravega bato por la Federacio okazis la unuan de decembro. Mortis la eksprezidanto K. G. J. DE JONG en sia 83a vivojaro. Prezidanto GIESSNER reprezentis la Federacion en la krematoria ceremonio. DE JONG estis 8 jarojn redaktoro kaj 10 jarojn prezidanto de IFEF. Pro sia agado li ricevis en 1969 la oran medalon de FISAIC kaj en 1975 fariĝis Honora Membro. En la IFK Olomouc (1991) li estis nomumita Honora Prezidanto (kiam fine la statuto tion ebligis). Flanke de la nederlanda Ŝtato li ricevis la ordenon Kavaliro de Oranje Nassau.

### **1986**

La 27a IFES okazis en la engadina vilaĝo Sils (CH) kun 51 personoj el 8 landoj. Kiel posteulo de Elfriede KRUSE la dana kolego Jan NIEMANN transprenis la funkcion de komisiito por la preparado de skisemajnoj.

En IF 1986.3 estis represita la IFEF-laborplano. En la jugoslavia horaro aperis klarigoj por pasaĝeroj en Esperanto.

La 38a IFK okazis en Skopje (YU) kun 715 partoprenantoj el 18 landoj. Inaŭguro de strato *Esperanto*. Forta publika eĥo. Du kolegoj el Jugoslavio estis honoritaj, nome la prezidanto Gvozden SREDIĆ per ora medalo de FISAIC kaj Josip ZUPANIĆ (90) per honora membreco de IFEF. La estraro estis reelektita. Ĝi konsistis el GIESSNER (pr), ENGEN (vicpr), RÖSEMANN (sekr), HAUGE (kas), OLSEN (red). Pri la pasintjara kongrespropono, ke IFEF eldonu membrokartojn, neniu reagis, sekve ili ne estis produktitaj.

Malgraŭ la malproksima loko en la kontaktkunveno de UK Beijing (Pekino) ĉeestis 51 fervojistoj el 15 landoj.

### **1987**

La 28a IFES okazis apud Sarajevo (YU) kun 60 partoprenantoj el 9 landoj. Esperanto-klarigoj troviĝis en la horaroj de 8 fervojoj (BG, CS, DK, HU, IT, YU, NO, PL).

La 39a IFK okazis en Katowice (PL), pro la jubilea jaro en la lando de Zamenhof. Partoprenis 422 personoj el 18 landoj. FISAIC-reprezentanto estis NICOLIĆ (YU). La patrono de la kongreso, la direktoro de la fervoja direkcio Katowice, inĝ. Aleksander RODAK, estis nomumita Membro de la Honora Patrona Komitato de IFEF. Slogano de tiu IFK estis *Espero, Obstino, Pacienco*. Forta publika eĥo, precipe pro Radio Varsovio. Gunnar THUESEN (DK) retiriĝis kiel gvidanto de la Fakprelega Komisiono. Li elstaris pro enkonduko de la ĉiam



interesaj *Aktualaĵoj el mia fervojo*. Kiel posteulo estis elektita inĝ. Ludoviko SEKEREŠ (YU). La komitato akceptis rezolucion kaj kelkajn statutŝanĝojn. Apud la direkcio estis plantita arbo. Post la kongreso okazis akcepto de la ministro por transporto en Varsovio. Prez. GIESSNER petis lin, subteni peton de IFEF, nomumi internacian trajnon *Zamenhof* aŭ *Esperanto*, kion li promesis. Bedaŭrinde poste okazis nenio.

Ankaŭ la UK ĉi-jare okazis en Pollando (Varsovio), ĝia kontaktkunveno kun 103 personoj el 11 landoj, eĉ kun ĉina kolego.

## 1988

Denove IFEF estis batita de l' morto. La 11an de januaro mortis la longtempa estrarano Otto WALDER (CH), 76 jarojn aĝa, esperantisto de 1938, Honora Membro de IFEF kaj honorita per ora medalo de FISAIC. Sennombrajn taskojn li plenumis en sia lando kaj por la fervojistoj kaj por UEA. Li estis vicprez. en la unua internacia IFEF-estraro, poste ties kasisto.

La 24an de februaro mortis la dana kolego Ingvard KENSING, 67 jarojn, Honora Membro, LKK-ano de tri IFK-oj. Grandan influon li havis en la evoluo de DEFA kaj ankaŭ de IFEF.

Krome ni ne preterlasu mencii la morton de du gravaj funkciuloj en Bulgario: la 1an de majo prez. Marin MARINOV kaj la 15an de julio eksprez. Georgi DOLAPCIEV, kiu posedis du ŝtatajn ordenojn.

La 29a IFES okazis en Spitzingsee (DE) kun 43 personoj el 8 landoj.

La 40a IFK estis en Perpignan (FR) kun 553 partoprenantoj el 19 landoj. FISAIC estis reprezentita de sia ĝen. prez. G. SCHMIT. Vicprez. ENGEN eksestraraniĝis kaj fariĝis Honora Membro. La funkcion transprenis inĝ. István GULYÁS (HU). La germana kolego Dieter HARTIG ricevis la oran medalon de FISAIC, prez. GIESSNER bulgaran oran medalon. Radioamatora stacio. Tiu kongreso fariĝis grava mejloŝtono, ĉar post jardekojn daŭraj klopodoj Gernot RITTERSPACH (DE), gvidanto de la Terminara Komisiono, prezentis la unuan ekzempleron de la *Esperanto-traduko de la seslingva UIC-terminaro*. Post la kongreso prez. GIESSNER kun 7 landaj prezidantoj partoprenis kiel oficiala IFEF-delegacio en la 50a jubileo de la franca FISAIC-sekcio en Paris. Ĉi-jare aliĝis al IFEF du novaj asocioj, nome Ĉinio kaj Germana Demokrata Respubliko. Estis starigita komisiono por adapti la statuton al la nuna situacio.

En la kontaktkunveno de la UK Rotterdam (NL) ĉeestis 80 personoj el 18 landoj. D-ro BÁCSKAI (HU) estis nomumita Honora Membro de UEA.

## 1989

Jubilea jaro por la fervojista movado. 80 jarojn ĝi atingis. Tripaĝa superrigardo fare de la prezidanto en IF 1989.1. Sekve de la jubilea jaro 1987 UEA eldonis "Jubilean Libron", en kiu FISAIC-prez. SCHMIT estis registrita. GIESSNER transdonis la libron al SCHMIT en ties oficejo en Luksemburgo.

La 30a IFES okazis en Mühlbach (AT) kun 47 personoj el 7 landoj.

La 41a IFK okazis en Salou (ES) kun 534 kongresanoj el 23 landoj. Ĝi elstaris pro aparta ekspozicio kaj forumo, en kiu altrangaj fervojistoj respondis ĉiuspeciajn demandojn. Reprezentanto de FISAIC estis s-ro STEPPE (BE), kiu ĉeestis la tutan kongreson, eĉ dum la kunsidoj. Speciala vespero pro la 80a IFEF-jubileo estis aranĝita. El la estraro ekzistis sekr. RÖSEMANN, posteulo fariĝis d-ro Romano BOLOGNESI (IT).

La kontaktkunvenon dum UK Brighton (GB) partoprenis 36 el 11 landoj.

Ankaŭ ĉi-jare la morto forprenis du elstarajn membrojn, nome la prezidantojn de Finnlando, N.G. NARVALA (4.3., 79jara) kaj de Nederlando, J.J. LABORDUS (12.6., 76jara). Ambaŭ estis Honoraj Membroj de IFEF, LABORDUS krome havis FISAIC-medalon. Kaj ambaŭ havis multege da meritoj por la fervojista kaj ĝenerala movadoj.

### 1990

La nova terminaro estis presita. Je 1.1.1990 ekvalidis novaj statuto kaj regularoj, akceptitaj en Salou. La prizorgado de la Koresponda Servo transiris al Georges JOLY (FR).

La 31a IFES estis aranĝita en Campo Túres/Sand in Taufers (IT). Ĝi forte estis ombrumita pro la subita morto de Gernot RITTERSPACH (DE) en trajno survoje al tiu IFES la 13an de januaro. Estis fulmo el serena ĉielo. Forpasis homo vere neniam anstataŭebla. Sen li la nova terminaro ne ekzistis. Decas denove legi la nekrologon en IF 1990.2, kiun skribis la germana kaj IFEF-prezidanto por sia amiko Gernot.

Venis la 42a IFK en Hamar (NO) kun 393 kongresanoj el 21 landoj. FISAIC estis reprezentita de Barbro ERIKSON (SE). Favorega sintenado de la urbestro, kongresejo en la urbodomo, la paroladoj en Esperanto, urba akcepto, stratinaŭguro, elstara koncerto en la katedralo, du specialaj trajnekskursoj al Rōros kaj Lillehammer. Post 22 jaroj GIESSNER eksprezidantiĝis kaj transdonis sian funkcion al Per ENGEN (NO). GIESSNER estis nomumita Honora Prezidanto. Gernot RITTERSPACH postmorte ricevis la oran medalon de FISAIC (la arĝentan li jam posedis). Jan BULTMAN (NL) estis elektita anstataŭnto de la ĉefkomitatano DE SUTTER.

Du novaj l.a. Estonio (EE) kaj Slovakio (SK) aliĝis. La kotizo estis fiksita je 6 svisaj frankoj. La kontaktkunvenon en la 75a UK La Habana (CU) ĉeestis 30 personoj el 15 landoj. En Hungario aperis 20-paĝa broŝuro *Indikoj pri la Hungaraj Ŝtataj*

*E.H. Olsen, H. Hauge, R. Bolognesi, J. Giessner, I. Gulyás*

*E.H. Olsen, H. Hauge, R. Bolognesi, P.Engen, I. Gulyás*

*Fervojoj* (MÁV) en Esperanto. Kvin landaj asocioj, nome BE, GB, FR, DE kaj NL komune aranĝis *Eŭropan Fervojistan Esperanto-Konferencon* 1.-7.10. en Spa (BE) kun 125 partoprenantoj el 12 landoj. La terminaran parton transprenis Dieter HARTIG (DE). Okazis du altnivelaj koncertoj, kiel jam ofte kun multaj kanto-tradukoj de GIESSNER, belegaj ekskursoj, folkloro, akcepto flanke de la urbo, libroservo.

Plurjara agado ĉe FISAIC montris bonan rezulton: Ties ĝenerala asembleo en oktobro 1990 akceptis francan proponon, parte oficialigi la lingvon Esperanto kiel trian laborlingvon apud franca kaj germana, precipe por korespondado kaj dokumentoj. Bedaŭrinde kutime ne ĉeestas sufiĉe da esperantistoj en la kunvenoj de FISAIC, tiel ke apenaŭ eblas uzi Esperanton dum kunsidoj.

La 11an de novembro estis refondita la rumana I.a. en ĉeesto de hon. prez. GIESSNER.

Necesas mencii la unuiĝon de la du germanaj ŝtatoj, Federacia Respubliko Germanio kaj Germana Demokrata Respubliko en aŭtuno 1990, ĉar rekte kaj nerekte ĝi havis multajn sekvojn ankaŭ por IFEF kaj la Esperanto-movado entute.

### **1991**

La 32a IFES okazis denove en Francio, en Les Contamines-Montjoie kun 58 partoprenantoj el 8 landoj.

La 1an de februaro mortis Pierre POLY (FR), Honora Membro, iniciinto kaj motoro de la franca l. a. tuj post la milito, kiu aktive partoprenis ankaŭ en fondo de IFEF.

La 43a IFK okazis en Olomouc (tiam ankoraŭ CS) kun 380 kongresanoj el 19 landoj. FISAIC estis reprezentita de sia ĝen. prez. G. SCHMIT, kiu kiel kutime salutparolis en senriproĉa Esperanto. Ĉiu ĉeestanto ricevis senpagan bileton por la tuta reto kaj por la urbaj trafikiloj. Rumanio denove aliĝis kiel l. a. al IFEF. Riĉenhavaj kongresbultenoj, belaj ekskursoj. Eksprez. DE JONG postmorte estis nomumita Honora Prezidanto. La ĉeha kolego Jaromír BABIČKA elektiĝis Honora Membro. Sekvis belega postkongreso en la slovaka urbo Z'ilina kun ekskursoj al Vrátna-valo kaj Altaj Tatroj.

En UK Bergen (NO) okazis kontaktkunveno kun 48 partoprenantoj el 14 landoj.

Por karakterizi la tiaman situacion, ni citu vortojn el la fina komentario de la jarraporto pri 1990 de sekr. BOLOGNESI: "...stagnon en kelkaj landaj asocioj, manko de junuloj, kresko de la nombro de pensiuloj, grandaj kaj rapidaj ŝanĝoj en la fervojaj organizoj, nedungado de novaj fervojistoj, ekonomiaj kaj socipolitikaj malfacilaĵoj en multaj landoj".

### **1992**

La 33a IFES okazis en Vrátna-valo (SK) kun 34 partoprenantoj el 7 landoj.

La Adopta Fonduso estis nove vivigita. Ĝi servas por ebligi al homoj el

nepagipovaj landoj fariĝi membroj de IFEF. La membronombro estis 1952, el kiuj 64 % da emerituloj.

La 44a IFK estis aranĝita en Münster (DE), la kvaran fojon en Germanio. Reprezentanto de FISAIC estis s-ro STEPPE (BE). Li salutis en Esperanto. Partoprenis 342 personoj el 22 landoj. LKK sukcesis disponi 3 kuŝvagonojn kaj tiel ebligis al pli ol 100 personoj el B-landoj (eksocialismaj landoj) ĉeesti en la kongreso. Kroatio nove aliĝis al IFEF. Urba akcepto, poŝta stampo, altnivela preĝeja koncerto, teatra vespero (i.a. *Soldato Ŝvejk*), fakvizito en Lathen (magnetŝveba fervojo), du fakprelegoj. La estraro estis reelektita (ENGEN, GULYAS, BOLOGNESI, HAUGE, OLSEN). Brila postkongreso en Friedrichsbrunn (Harcmontaro, orienta parto) kun interesaj ekskursoj kaj folkloro. Aperis la unua kajero de *Fervojfakaj Kajeroj*, redaktita de L. KOVÁČ, (CZ). Pro morto de kol. DEMISSY la Koresponda Servo transiris al Germano GIMELLI (IT).

La fervojista kontaktkunveno en la 77a UK Vieno (AT) okazis kun 82 personoj el 15 landoj.

FISAIC organizis jubilean ĝeneralan Asembleon en Millau (FR). Ĉar tie ĉeestis 13 esperantistoj, la Internacia Lingvo eĉ estis praktike uzita dum la diskutoj. Kiel tradukanto funkciis GIESSNER kun la germanlingva interpretisto de FISAIC.

La 4an de aŭgusto mortis en Aŭstrio Johann BÜRGER (95). Li estis la kreinto de la kongresinsigno Linz (1959), kiu poste fariĝis la federacia insigno de IFEF.

### 1993

La 34a IFES okazis en Hasliberg (CH) kun 42 personoj el 10 landoj.

La ĉefkomitatano Lucien DE SUTTER (BE) ricevis ŝtatan medalon Kavaliro en la Ordeno de la Krono.

Je 1.1.1993 la Ĉeĥo-Slovakaj Fervojoj estis dividitaj en Ĉeĥaj Fervojoj (ĈD) kaj Slovakaj Fervojoj (Z'SR). Same je 1.1.1993 la Fakgrupoj en la tereno de iama GDR ĉesis ekzisti kaj unuiĝis kun GEFA. Sekve ekde nun ekzistis nur unu germana l. a. en IFEF. La 13an de marto oficiale estis fondita Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA). Komence de 1993 IFEF havis 57 fakdelegitojn de UEA.

En Cervia (IT) estis aranĝita la 45a IFK kun 469 kongresanoj el 24 landoj. FISAIC-reprezentanto estis ties kasisto Jakob TSCHANZ (CH). Li salutis en klare prononcita Esperanto. Sekve de la politikaj eventoj de la pasintaj jaroj estis akceptitaj la l. a. Ĉeĥio, Slovakio kaj Slovenio. Elstaris belaj muzikaj programoj, sed kun troa uzo de la itala lingvo. En tiu IFK kaj dum 2 postkongresaj ekskursoj estis inaŭguritaj entute tri Esperanto-objektoj, nome placo (Cervia), strato (Venecio, insulo Lido) kaj ŝtuparo (Predappio). Ĉefe pro manko de gvidanto estis unuigitaj la Terminara kaj la Fake Aplika Komisionoj. Estis fondita nova Faka Komisiono kun gvidanto d-ro József HALÁSZ (HU). Ĝi funkciis per Terminara Sekcio (sekr. d-ro Heinz

HOFFMANN (DE)) kaj Fake Aplika Sekcio (sekr. inĝ. Ladislav KOVÁŘ (CZ). Redaktoro de la *Terminara Kuriero* restis Dieter HARTIG (DE). La membronombro de IFEF malkreskis al 1673.

En la kontaktkunveno de la 78a UK en Valencia (ES) partoprenis 35 personoj el 14 landoj. ĉeestis la UEA-prez. John WELLS.

Dufoje la hon. prez. GIESSNER vizitis la direktoron de la direkcio Katowice (PL) kaj poste la ĝen. dir. de PKP en Varsovio, por trakti la tute ne novan planon, nomumi internacian trajnon per *Esperanto* aŭ *Zamenhof*. Ambaŭ promesis sian helpon. Kaŭzo, kial nenio okazis, ne estas konata.

#### 1994

La unuan fojon la rumanoj kuraĝis aranĝi IFES (la 35an) en Polana Brašov kun 22 partoprenantoj el 7 landoj.

La 7an de marto mortis Gunnar THUESEN (DK), multjara gvidanto de la Fakprelega Komisiono. Li enkondukis la novspecajn fakajn prelegetojn *Aktualaĵoj el mia fervojo*. Estis grava pliriĉigo de la faka kongresprogramo. Dua mortbato estis la forpaso de unu el la plej elstaraj kaj ŝatataj personoj, la franca eksprezidantino Germaine LEMONNIER, la 28an de septembro en aĝo de 89 jaroj. Ŝi estis kunfondinto de IFEF kaj de FISAIC, en kiu ŝi konstrue agis de la kvindekaj jaroj. Multajn jarojn kiel franca prezidantino kaj komitatanino ŝi modele kaj ĉiam pozitive kunlaboris en la federacia vivo. Estis virino, kiu certe havis nur amikojn.

La 46a IFK okazis en Krems (AT) kun 401 kongresanoj el 21 landoj. FISAIC estis reprezentita de sia vicprez. d-ro SEMMELRATH (AT). Protektanto la trafikministro KLIMA. Oran FISAIC-medalon ricevis Pierre ROBIOLLE (FR). Kvar numeroj de *Kongreskuriero* (redaktis ilin A. PETTYN de Pola Radio), elstara kultura programo, bela ekskurso per etŝpura fervojo al Mariazell, tie estis plantita arbo. Ĉeestis la nova ĝen. sekr. de FISAIC, la franca IFEF-membro G. WALLERAND. Pro la pasintjara starigo de la Faka Komisiono en Krems estis akceptitaj kelkaj ŝanĝoj en statuto kaj regularoj.

La kontaktkunvenon en la 79a UK en Seoul (Koreio) ĉeestis 31 personoj el 12 landoj.

Ĉiujn kontaktkunvenojn de la lastaj jaroj gvidis IFEF-viceprez. GULYAS, komitatano A flanke de IFEF en UEA.

En IF 1994.6 aperis informa artikolo pri la rilatoj inter FISAIC kaj IFEF de Joachim GIESSNER. Krome GIESSNER ĉi-jare eldonis muzikkasedon kaj KD sub nomo *Kantoj de l' popolo*. Ili prezentis 21 de li tradukitajn slovakajn popolkantojn kun aldonitaj tekstfolioj. Ludas kaj kantas slovakaj ensembloj.

## 1995

La 36a IFES okazis denove en Mühlbach (AT) kun 42 partoprenantoj el 6 landoj.

La 47a IFK estis aranĝita en Pécs (HU) kun 327 personoj el 23 landoj. ĝen. prez. G. SCHMIT (LU) reprezentis FISAIC kaj salutis kiel jam ofte en senriproĉa Esperanto, same la ĝen. dir. de MÁV, inĝ. Z. RIGÖ. Kiel kutime bona organizado, 4 kongresbultenoj, belaj kulturaj programeroj, instruaj ekskursoj. akcepto ĉe direktoro de la direkcio Pécs, prezentado de uniformoj, radioamatora stacio. El la estraro ekzistis redaktoro H. OLSEN (DK). Li fariĝis Honora Membro. Lin anstataŭis Erna HAUGE (DK). Sekve nova estraro ENGEN, GULYÁS, BOLOGNESI, Henning kaj Erna HAUGE. Dum la tuta kongreso fervoja kuracisto estis je dispono. La jara kotizo estis (iom ridinde) plialtigita de 6 al 6,50 svizaj frankoj. Tio aŭguris baldaŭan denovan plialtigon.

La situacio en kelkaj okcidentaj landoj konsiderinde malfavoriĝadis. Precipe mankis pli kaj pli da junuloj, ĉefe pro ĉieaj organizaj ŝanĝoj de la fervojoj. Tiu ĉi IFK estis la unua, al kiu aliĝis pli da kongresanoj el ekssocialismaj landoj (B-landoj) ol el okcidento. La Koresponda Servo transiris de G. GIMELLI (IT) al dipl. inĝ. Sorin PORUPKA (RO). La nombro de fervojistaj fakdelegitoj de UEA estis 56 en 19 landoj. Sekvis kelktaga postkongreso, kiu donis multajn interesajn detalojn pri hungaraj urboj kaj moroj. Per busoj ĝi iris tra meza Hungario kaj Budapeŝto, finiĝante en Viŝegrado apud Danubo.

La kontaktkunveno en la 80a UK Tampere (FI) ĉeestis 54 personoj el 16 landoj. La hon. prez. de IFEF, GIESSNER, tie estis nomumita Honora Membro de UEA.

Menciendas denove du mortintoj. En januaro membro de Honora Patrona Komitato de IFEF, eksĝen. dir. de MÁV, RÖDÖNYI (83) kaj la 29an de aŭgusto inĝ. Jaromír REBICEK (CZ) en aĝo de 87 jaroj, Honora Membro. Dum jardekoj li senbrue laboregis sur terminologia kampo.

## 1996

La jaro komenciĝis per la 37a IFES en Kouty p/Desnou (CZ) kun 39 partoprenantoj el 6 landoj.

La 48an IFK-on aranĝis Nederlando en Hago. Ĉeestis 295 kongresanoj el 21 landoj. La kongresejo troviĝis favore en la Centra Stacidomo. Ĉiuj parolantoj en la inaŭguro uzis la Internacian Lingvon. UEA estis reprezentita de la ĝen. dir. de sia Centra Oficejo, Osmo BULLER. Por FISAIC venis ties ĝen. prez. Gilbert SCHMIT, sed nur fine de la kongreso. Li honorigis la kasiston H. HAUGE per ora medalo. La germana kolego W. BARNICKEL estis nomumita Honora Membro. Oni aŭdis koncerton de elstara blovorkestro kaj ĝuis interesajn

*E. Hauge, H. Hauge, I. Gulyás, P. Engen, R. Bolognesi*

ekskursojn. Ili i. a. ebligis viziton de la UEA-sidejo en Rotterdam kaj rigardon al la tiam nova THALYS-trajno. Admirinde estis, kiel la nur kelkpersona LKK majstris la tutan kongreson. En IF 1996.1 aperis listo de ĉiuj honoritoj tiam vivantaj.

Dum la kontaktkunveno en la 81a UK en Praha (CZ) ĉeestis 87 personoj el 19 landoj. Okazis instrua trajnekskurso al la Eksperimenta Instituto de ĈD en Cerhenice.

La morto forprenis unu el la plej elstaraj personoj de IFEF, la hungaran eksprezidanton d-ron István BACSKAI en aĝo de 88 jaroj. Liaj meritoj kaj honorigoj estis tiom multnombraj kaj gravaj, ke ne eblas mencii ilin ĉi-loke. Ni nur elektas: Honora Membro IFEF, ora medalo FISAIC, Honora Membro de UEA, multaj ŝtataj ordenoj. Li multe verkis, havis altajn funkciojn en diversaj organizoj, estis multjare komitatano de IFEF kaj UEA. Saĝa kaj bonhumora homo, fidinda kamarado. Dum pli ol 50 jaroj li laboregis por Esperanto.

### 1997

La 38a IFES ĉi-jare estis en Mühlbach (AT) kun 15 personoj el 5 landoj.

Fine de 1996 en IF 1997.2 la kasisto anoncas 1.517 membrojn. La frontpaĝo de IF 1997.3 prezentis la ĝis tiam plej gravan rezulton de la terminara agado, nome 13 dulingvajn terminarojn. Ili baziĝis sur dua eldono de *RailLexic*. La 13 lingvoj estis angla, ĉeĥa, dana, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, pola, portugala, rumana, sveda kaj en ĉiuj 13 volumoj Esperanto. Estis grandega sukceso de la hungaraj kolegoj, ke la hungara fervojo MÁV produktis tiujn terminarojn, kiuj estis aĉeteblaj laŭ ĉiu dezirata kombinaĵo de la 14 lingvoj. Krome aperis CD-ROM kun ĉiuj lingvoj kune.

Vxiuj volumoj estis oficiale prezentitaj dum la 49a IFK en Košice (SK). ĝin partoprenis 194 personoj el 21 landoj, pli da ili el B-landoj ol el okcidento. FISAIC estis reprezentita de J. TSCHANZ (CH), kiu denove salutis en bone prononcita Esperanto. Okazis akcepto flanke de la urbo. Post 20 jaroj en tiu funkcio la ĉefkomitatano Lucien DE SUTTER retiriĝis kaj fariĝis Honora Membro. Kiel posteulo estis elektita Jean RIPOCHE, la franca prezidanto. Ankaŭ la prezidanto de la jugoslavia l. a., Gvozden SREDIĆ, elektiĝis Honora Membro pro sia multjara agado en kaj por IFEF. Hubert PEYROUTY (FR) transprenis la funkcion de komisiito por skisemajnoj. Aperis sesdek-paĝa kongreslibro kaj tri bonege de Stano MARŠEK redaktitaj Kongreskurieroj. El la programo menciindaj estis belegaj muzikaj kaj folkloraj prezentaĵoj kaj instruaj ekskursoj.

En la centro de Košice de post tiu IFK troviĝas ŝtona memortabulo en la pavimo apud la katedralo. Sekvis belega postkongreso en Altaj Tatroj.

La kontaktkunvenon de la 82a UK en Adelaide (Aŭstralio) ĉeestis 20 personoj el 9 landoj.

La morto denove forprenis elstaran IFEF-membron, kolegon Hans BIPP (CH). Li mortis 4.11.1997. Li ludis rolon jam dum la unuaj jaroj de IFEF kaj FISAIC, kiam li tie pledis por Esperanto kiel laborlingvo en FISAIC. Li estis multjara kunlaboranto en la Terminara Komisiono, multajn funkciojn li havis en sia svisa asocio.

## 1998

La 39a IFES okazis apud Maribor (SL) kun 35 personoj el 9 landoj.

Fine de 1997 IFEF havis 1.461 membrojn. Fakte povis esti pli da ili, sed ankoraŭ al la iamaj socialismaj landoj (B-landoj) ne eblis pagi la kotizojn por sia vera kaj ofte kreskanta membronombro. Kontraste al tio en la okcidentaj landoj la membronombro kontinue malkreskis pro la ĉiea disbatado de la fervojoj kaj nombra malaltigo de la fervojistaro.

La 50a jubilea IFK okazis en Aalborg (DK). Ĝi estis la kvina IFK en Danio. Partoprenis 263 kongresanoj el 21 landoj, inter ili rumana grupo de ĉ. 90 personoj. Ĝen. prez. G. SCHMIT (LU) reprezentis FISAIC-on. Okazis gravaj ŝanĝoj. Estis elektita nova estraro: prez. d-ro BOLOGNESI (IT), vicprez. inĝ. GULYÁS (HU), sekr. QIETENSKY (AT), kas. H. HAUGE (DK), red. RIPOCHE (FR). Nova ĉefkomitatano fariĝis TOMIŠEK (CZ), lia anstataŭantino FEIFIČOVÁ (SK). Per ENGEN estis nomumita Honora Prezidanto. Krome li ricevis la oran medalon de FISAIC. La ĝistia redaktorino Erna HAUGE fariĝis Honora Membro. Memore al la kongreso estis plantita arbo en parko inter stacidomo kaj kongresejo. Lumbildprelego de J. GIESSNER vekis memorojn pri ĉiuj ĝisnunaj IFEF-kongresoj. Folkloro kaj du instruaj ekskursoj donis impreson pri tiu norda parto de Danio. Krome la faka laboro postulis la kutimajn tempon kaj rangon. Aldoniĝis vizito de la trafika muzeo en Odense. Postkongreso okazis en Kopenhago.

La kontaktkunvenon de la 83a UK en Montpellier (FR) vizitis 71 personoj el 18 landoj.

Baldaŭ post la IFK Aalborg la morto denove kruele batis. La 15an de junio ĝi forprenis Erna HAUGE en aĝo de 66 jaroj. Ĝis la lasta spiro ŝi laboregis por sia amata Esperanto, ankaŭ dum la 50a kongreso, spite al sia grava malsano, spite al sia antaŭsentita morto. Modela kaj ĉie ŝatata esperantistino adiaŭis la mondon kaj siajn multajn geamikojn.

*J. Ripoché, H. Hauge, E. Quietensky, R. Bolognesi, I. Gulyás*



## **1999**

La 40a IFES okazis en Karpach (PL) kun 13 partoprenantoj el 5 landoj.

AI la 51 a I FK en Le Mans (FR) aligis ĝis la mezo de aprilo 215 personoj el 19 landoj.

En la Jarlibro de UEA trovigas 37 fakdelegitoj pri Fervojo.

La 1 an de januaro 1999 sep cinaj fervojistoj ekiris de la havenurbo Lianyungang. Ili planas marsadi 11.000 km tra Ĉinio, Kazahio, Rusio, Bjelorusio, Pollando kaj Germania por atingi la sidejon de UEA en Roterdamo (NL) en la jaro 2000.

## 12-a ĉapitro

### Funkciuloj de la Fervojista Movado Ĉiuj estraranoj de 1984 ĝis 1999

De jaro	Ĝis jaro	Elektita en IFK	Nomo	El lando	Funkcio
1968	1990	Varna	GIESSNER, Joachim	DE	prezidanto
1974	--	Tarragona	HAUGE, Henning	DK	kasisto
1980	1988	America	ENGEN, Per	NO	vicprezidanto
1982	1989	Balatonfüred	RÖSEMANN, Otto	DE	sekretario
1982	1995	Balatonfüred	OLSEN, E. Henning	DK	redaktoro
1988	--	Perpignan	GULYÁS, István	HU	vicprezidanto
1989	1998	Salou	d-ro BOLOGNESI, Romano	IT	sekretario
1990	1998	Hamar	ENGEN, Per	NO	prezidanto
1995	1998	Pécs	HAUGE Erna	DK	redaktoro
1998	--	Aalborg	d-ro BOLOGNESI Romano	IT	prezidanto
1998	--	Aalborg	QUIETENSKY, Ernst	AT	sekretario
1998	--	Aalborg	RIPOCHE, Jean	FR	redaktoro

### Honoraj Prezidantoj

1990	Hamar	GIESSNER, Joachim	DE
1991	Olomouc	DE JONG, K. G. J..	NL
1998	Aalborg	ENGEN, Per	NO

## Honoraj Membroj de UEA

Jaro	Elektita en UK	Nomo	Lando
1988	Rotterdam	d-ro BÁCASKAI, István	HU
1995	Tampere	GIESSNER, Joachim	DE

## Honoritoj

### flanke de IFEF

### kaj de FISAIC

Jaro	Nomo	Lando	Jaro	Nomo	Lando
1985	LEMONNIER, Germaine	FR	1986	SREDIC, Gvozden	YU
1986	ZUPANIC, Josip	YU	1988	HARTIG, Dieter	DE
1988	ENGEN, Per	NO	1990	RITTERSPACH, Gernot	DE
1991	REBÍCEK, Jaromír	CZ	1994	ROBIOLLE, Pierre	FR
1995	OLSEN, Henning	DK	1996	HAUGE, Henning	DK
1997	DE SUTTER, Lucien	BE	1997	SREDIČ, Gvozden	YU
1998	HAUGE, Erna	DK	1999	RITTERSPACH, Gernot	DE (postmorte)
1999	RÖSEMANN, Otto	DE			

*Kornelius G.J. de Jong*

*Joachim Giessner*

*Per Engen*

## 13-a ĉapitro

### La internacia organo

Ankaŭ dum la pasintaj 15 jaroj la *Internacia Fervojisto* plenumis siajn taskojn: interligi la Federacion kun la membraro kaj havigi al la membroj ĉiujn necesajn informojn. Krome ne subtaksinda estas la dokumenta valoro de IF, ĉar ĉiaj diversspecaj kontribuajoj estas kvazaŭ legolibro pri vivo kaj evoluo de la Federacio, eĉ donas impresojn pri la vivkondiĉoj de la fervojistoj.

Ankaŭ de 1984 ĝis 1999 IF regule aperis sesfoje jare kun multaj instruaj bildoj. La jara paĝonombro kutime estis 96, kiujn ĉiuj redaktoroj kapablis provizi per interesaj informoj el la vivo de IFEF kaj el ĉiuj anguloj de la fervojista mondo.

Redaktoroj estis

E. Henning OLSEN

DK 1982 - 1995

Erna HAUGE

DK 1995 - 1998

Jean RIPOCHE

FR 1998 -

Ĉiuj numeroj de *Internacia Fervojisto* resp. iama *Bulteno* estis kunigitaj en deko da bele binditaj volumoj, kiuj de post 1998 troviĝas ĉe la redaktoro.

Post tiu iom ĝenerala superrigardo, la redaktoro el la plej longa periodo, E. H. OLSEN, prenu la vorton:

La evoluolinio de la federacia organo (en direkto al pli faka enhavo), kiun klopodis komenci jam en 1983 redaktoro Olsen, estis laŭ la eblecoj daŭrigita. Novaj litertipoj de la titolo ek de januaro 1991, verdigo de la stelo kaj verda kadro ĉirkaŭ la kolofono ek de januaro 1992, situŝanĝo de la IFEF-emblemo kaj verda kadro ĉirkaŭ la frontbildo ek de januaro 1993, estas videblaj signoj de certaj aspektaj plibonigoj. La konstanta tajpado, poste komputila trakto fare de Erna Hauge, garantiis daŭran plej eble agrablan aspekton de la teksto.

Kelkaj fidelaj tradukantoj de fakaj informoj plenigis konsiderindan parton de la enhavo, je bedaŭro de kelkaj, kiuj konsideris la informojn ne

sufiĉe novaj. La sola rebato al tio ja estis: bonvolu liveri pli aktualajn! Kaj tio efektive okazis iom post iom.

Dum la redakta periodo de E. Henning Olsen ĉiujare dum IFK okazis Redaktora Kunveno, dum kiu redaktantoj de landaj periodaĵoj povis diskuti la enhavon de IF kaj aliajn komun-interesajn temojn. Same la t. n. Redaktora babilo, kiu 77 fojojn plenigis kolumnon sur la dua paĝo, kaj en kiu la redaktoro filozofiis pri plej diversaj temoj, finiĝis - cetere je la bedaŭro de pluraj legantoj.

En 1995 Erna Hauge - spite al propraj duboj - transprenis la redaktadon kaj kompetente daŭrigis la antaŭan redaktan linion, ĝis en 1998 ŝi devis rezigni, kaj Jean Ripoche (FR) 'avancis' de ĉefkomitatano al redaktoro.

La presado de IF okazis en Naestved (DK) de jaro 1983 ĝis 1998 kaj ek de n-ro 1998.4 en Parizo.

*La nuna prezidanto d-ro Romano Bolognesi*

## 14-a ĉapitro

### Fakaj Komisionoj kaj prelegoj

#### A Terminara komisiono (TK)

##### ekde 1994 Faka Komisiono (Terminara Sekcio)

En 1984 ankoraŭ ekzistis du fakaj komisionoj, nome la Terminara kaj la Fakprelega.

Ni traktu unue la agadon de la Terminara Komisiono. Ni retrorigardu al 1976, kiam la germana kolego Dieter HARTIG komencis eldoni la novan internacian komunikilon *Terminara Kuriero* (TeKu), kiu forte plivigligis la laboron inter la TK-anoj. Krome HARTIG poste havigis al si komputilon, kio donis tre pozitivan impulson al TK. Tamen la malfacilaĵoj estis preskaŭ nesupereblaj. HARTIG devis elpensi kaj krei specifajn programojn. Gernot RITTERSPACH (DE), la tiama motoro kaj gvidanto de la Terminara Komisiono, nomis tion ‘aŭtodidakta majstraĵo’. Sed parolu RITTERSPACH mem pri la tiama (1984 - 1989) situacio kaj la naskiĝvojo de nia nuna terminaro:

"Antaŭ ol alfabetigi la Esperanto-tradukojn nepre necesis anstataŭigi la provizorajn per la definitivaj numeroj uzotaj de UIC por la kvara eldono. Tio kaŭzis grandan embarason, ĉar tiuj numeroj ne ekzistis surpapere, nur sur 20 diskedoj kun registraĵo de la tuta manuskripto, po unu diskedkompleto ĉe ĉiu fervojo. Finfine, post nepriskribeblaj malfacilaĵoj mi ricevis ‘grandaniman’ permeson de la informatika servo de DB en Frankfurt, vespere post deĵorfino preni la paperpakon, sur kiun oni elpresigis la diskedenhavon, sed frumatene antaŭ deĵorkomenco mi devis reporti ĉion (el mia loĝloko Mainz = 40 km) al Frankfurt, por ke oni povu tie labori pri la indekso. Estis vere sizifa laboro, Ŝanĝi 10. 205 numerojn manskribe en nia tradukfoliaro, precipe, ĉar la vortsinsekvo estis komplete ŝanĝita, kaj mi devis rekoni el franca kaj germana tekstoj sur la paperbendo la koncernan Esperanto-tradukon! Nu, ankaŭ tiu laborego finiĝis sukcese, kaj HARTIG povis nutri sian komputilon per la definitivaj numeroj. Poste li fine povis alfabete vicigi la Esperanto-tradukojn por krei indeksojn."

La giganta laboro de la duo RITTERSPACH - HARTIG rezultigis, ke 1988 en la kongreso de Perpignan povis esti prezentata la provizora eldono de la unua laŭnumera parto kun 138 paĝoj. La dua parto kun alfabetita indekso estis dissendita en julio 1988 al la kunlaborantoj de TK por trastudi ĝin. Pli ol mil ŝanĝproponoj alvenis. Ni denove citas RITTERSPACH:

"Mi mem dufoje traplugis la tutan verkon, unufoje laŭ la alfabetita registro kaj unufoje laŭ la finfine aperinta *UIC-Terminaro*. Zorge mi elektis, kion ŝanĝi, kion lasi. Ĉion konsideri estus signifinta rekomenci diskutadon, preskaŭ nove skribi ĉion. Do, ŝraŭbo senfina. Zorgeme kaj skrupule mi faris la lastajn

*G. Ritterspach*

decidojn pri proponitaj ŝanĝoj. HARTIG pacience korektadis en la komputilo ĝis lasta momento, eĉ post finpretigo de la preta paperaro li ankoraŭfoje devis anstataŭigi pli ol cent paĝojn pro etaj eraroj."

Tiel kvazaŭ naskiĝis la Plena Vortaro de la fervojistoj. Nun la preta *Fervoja Terminaro* de IFEF kiel *Suplemento al la UIC-Terminaro LG IV* povis aperi. Ĝi estis transdonita al la publiko en la IFEF-kongreso de Salou 1989. Tie oni konsekvence decidis, ke la landaj asocioj de IFEF preparu kaj starigu nacilingvajn terminaretojn surbaze de la nova terminaro. Baldaŭ kelkaj landoj publike eldonis siajn naciajn terminaretojn, laŭvice Germanio, Hungario kaj Italio.

Okazis la konataj eventoj en 1989, kiuj renversis la situacion en multaj landoj. Tio ankaŭ influis la UIC-terminaron. Ne daŭris longe, ĝis UIC decidis pliampleksigi sian *LG IV* per kvar lingvoj, inter ili la hungara. Danke al nia tre aktiva hungara grupo ankaŭ **Esperanto kiel 11a lingvo** fine estis planita aperi en la UIC-terminaro. Bedaŭrinde monatojn poste Gernot RITTERSPACH mortis. HARTIG transprenis la gvidadon de la Terminara Komisiono. Sed pro ties malsaniĝo fine de 1991 d-ro József HÁLASZ (HU) daŭrigis la gvidadon.

Sekve de tiu evoluo necesis grava organiza ŝanĝo. La komisionojn *Fake Aplika kaj Terminara* oni kunigis al unu *Faka Komisiono* kun du sekcioj, nome Terminara Sekcio sub sekr. d-ro Heinz HOFFMANN (DE) kaj Fake Aplika Sekcio sub sekr. Ladislav KOVÁR' (CZ), ambaŭ komune sub gvidado de d-ro HÁLASZ. Kontinue aperis *TeKu* por ambaŭ Sekcioj sub kutima redaktado de HARTIG. Tiuj ŝanĝoj okazis en Cervia 1993 kaj laŭstatute ekvalidis en 1994 en Krems.

En tiu periodo UIC anstataŭigis sian *Leksikonon Ĝeneralan* per elektronika datumbanko *RailLexic*. Pro speciala rolo de la Hungaraj Ŝtatfervojoj MÁV en tiu projekto kaj danke al bonaj rilatoj inter MÁV kaj la hungaraj IFEF-anoj eblis aranĝi komunan laborkunsidon en Frankfurt/M. en aŭgusto 1992. Ties grava ĝojiga rezulto estis decido, ke en *RailLexic*-projekto IFEF partoprenos samrange kiel ĉiuj aliaj fervojoj. Esperanto tiel estiĝis unu el la datumbankaj lingvoj.

UIC planis, paŝe enigi pli kaj pli da lingvoj. La unua eldono de *RailLexic* aperis en 1995 kun dekunu lingvoj, (aldone la hungara, pola, portugala, sveda kaj Esperanto). En la dua eldono aperinta en 1997 krome troviĝas la ĉeĥa, dana kaj rumana, do entute dekkvar lingvoj. Tiun evoluon oni volos daŭrigi. Sekve pli kaj pli malaperas la neceso krei nacilingvajn vortarojn fare de la esperantistoj.

UIC planis, ĉiujare aldoni novajn terminojn. Vere, en la unua eldono de *RailLexic*, suplemento konsistis el 875, en la dua eldono el 944 fakaj esprimoj. Do, la perioda aktualigo jam tre ampleksas.

UIC planis aldoni difinojn por novaj nocioj. Tio okazis unuafoje en 1996 prepare al la dua *RailLexic*-eldono.

Kun la ebleco, krei taŭgajn terminojn surbaze de difinoj, komenciĝis tria periodo laŭkvalita. Grava manko estas, ke nia komisiono ne en ĉiuj subfakoj kaj subfaketoj disponas pri ekspertoj klare sciantaj, kiuj nocioj kaŝas sin malantaŭ terminoj anglaj, francaj aŭ germanaj. Cetere, nacilingvaj terminoj

ofte naskiĝas tro spontane, kaj pro tio ne estas bona bazo por traduko. Do, sole difino sufiĉe taŭgas por kreo de termino.

Tamen restas ĉirkaŭ dek mil fakaj esprimoj - inter ili plej gravaj - sen difino. Montriĝas alia grava manko. En multaj fervojaj subfakoj ne okazis internacia lingvonormigo kiel en scienco kaj tekniko. Sekve ekzistas nacie diferencaj nociosistemoj. Tio kaŭzas ne ekvivalentajn naciajn difinojn. En internacia planlingvo necesas komplika terminologia laboro, por trovi taŭgajn - ĉefe kompromisajn - solvojn. Kiel unuan etan paŝon la Terminara Sekcio ellaboris ĉi-koncernan modelan *Nocioelektan Kontribuon*, kiu temas pri sep malgrandaj, sed gravaj fervojaj nociokompleksoj. Ĝi estis prezentita al UIC en 1995.

Tre grava evento atingis la sektion en 1996. Ni estis petataj, kontribui al nuna revizio de *Plena Ilustrita Vortaro*. Tio estis granda honoro, kiu spegulas la reputacion de nia terminara agado. El akcepto de la tasko estiĝis dudek-paĝa proponaro pri fervojfakaj terminoj kaj ties difinoj.

La aktuala enhavo de datumbanko *RailLexic* estas publikigebla en tri formoj. Unue sur kompakta disketo 'CD-ROM' kun ĉiuj lingvoj, due sur aro da unuopaj disketoj, kaj trie en plurlingvaj libroj. Danke al la bona kunlaboro inter nia hungara grupo kaj MÁV, eblis presi 13-voluman serion da dulingvaj libroj enhavantaj la duan eldonon de *RailLexic*. Ĉiuj volumoj enhavas Esperanton kiel unuan lingvon. Dum la 49a IFEF-kongreso en Košice 1997 tiuj bonkvalite binditaj libroj estis prezentitaj por vendo.

Ni ne kaŝu, ke daŭra laboro por *RailLexic* ege streĉos la kunlaborantojn, ĉar UIC ofte fiksas mallongajn tempolimojn Por plenumado de taskoj.

Precipa ŝarĝo estas la decido de UIC, enigi grandan kvanton da ne fervojtipaj nocioj, ekzemple el ĝenerala tekniko, telekomuniko, datumprilaboro ktp. en la datumbankon. Ankaŭ tiuj terminoj estas tradukendaj. Laŭ aktuala adresaro pretas kunlabori en la sekcio 42 gekolegoj el 15 landoj. Tamen aparta tasko en 1997 estis, traduki *Terminaron de Kombinita Trafiko* kun difinoj fare de nur tri kunlaborantoj.

**Perspektivo:** Tiu nuna situacio en la terminara agado de IFEF, tiu samrajteco kune kun pli ol deko da aliaj, parte plej gravaj lingvoj, estas la realigo de ideoj, kiujn multaj kolegoj nutris ekde la komencaj jaroj de la fervojista Esperantomovado. Ni sukcesis atingi ion, kion oni ĝis antaŭ ne longe vidis kiel utopian revon. Certe ni povas fieri, ke IFEF oficiale estas rigardata kaj traktata samrajte. Sed tio enhavas gravegan devigon: Ni nome devos montri, ke ni daŭre kapablos kontribui kaj konstrue kunlabori laŭ tiu nun atingita pozicio. Tio postulos laboremajn kaj kapablajn kunlaborantojn.

Klare estas, ke la fervojistoj en la kadro de mondvasta terminara verko de la internacie aganta, ĉie respektata, neesperantista organizo UIC prezentas kaj ebligas praktikan kaj nepretervideblan uzadon de la internacia lingvo Esperanto.



**B Fakprelega Komisiono,  
ekde 1989 Fake Aplika Komisiono,  
ekde 1994 Fake Aplika Sekcio**

Komence de la raporto-epoko en 1984 ankoraŭ validis la nomo *Fakprelega Komisiono*. Ĝi laboris sub gvidado de Gunnar THUESEN (DK) kun sekretario Gernot RITTERSPACH (DE) laŭ la metodo, kiu estis praktikita de post 1960. Laŭ ĝi la gastiganta l. a. de IFK prezentis minimume unu ĉefan fakprelegon, kiu antaŭe estis reviziita de TK.

En la IFK Regensburg 1981 THUESEN enkondukis aldonajn prelegetojn sub nomo *Aktualaĵoj el mia fervojo*. Laŭ tiu stato la FK funkciis ankaŭ en 1984 en la 36a IFK Slanĉev Brjag. Tabelon pri la ĉefaj preletoj vi trovas sur paĝo ... Titoloj de la multnombraj *Aktualaĵoj* estas troveblaj en la ĉiujara *Internacia Fervojisto*. La nomoj de la plej multaj aŭtoroj troviĝas en la listo sur paĝo ...

En 1987 (IFK Katowice) THUESEN retiriĝis. Lia posteulo fariĝis Ludoviko SEKEREŠ (YU). Sed jam en 1989 la ĉeĥa kolego Petr CHRDLÉ transprenis la gvidadon. Jam en IFK Salou 1989 la komitato akceptis, ke laŭ propono de CHRDLÉ la nomo de FK estis ŝanĝita al *Fake Aplika Komisiono* (FAK). La metodoj de laboro kaj prezentado esence restis la samaj.

Tamen kelkaj eventoj en tiu tempo kaŭzis gravajn ŝanĝojn. En 1990 subite mortis la gvidanto de la *Terminara Komisiono*, RITTERSPACH. La redaktoro de *TeKu*, D. HARTIG, devis transpreni la gvidadon de TK. CHRDLÉ forlasis la fervojon, kaj HARTIG baldaŭ malsaniĝis. Sekve oni devis nove ordigi la administradon de la du komisionoj. Sed mankis taŭgaj kaj bonvolemaj personoj. Fine en IFK Cervia 1993 oni trovis solvon: Oni kunigis la du memstarajn komisionojn sub nomo *Faka Komisiono* sub gvidado de la hungara kolego d-ro József HALASZ. Tiu nova komisiono havis du sekciojn, nome *Terminaran Sekcion* (TS) kun sekretario d-ro Heinz HOFFMANN (DE) kaj *Fake Aplikan Sekcion* (FAS) kun sekretario Ladislav KOVAR' (CZ). La redaktado de *TeKu*, kiu ankaŭ havas signifon por FAS, restis en la manoj de HARTIG (DE).

Laŭ tiu sistemo la FK kun siaj du sekcioj kontentige funkcias. Sed ni konstata gravan kompletigon, kiu paralele al la priskribita evoluo okazis de post 1990. IFEF komencis eldoni *Fervojfakajn Kajerojn*, kies unua aperis 1990. Sed pluraj sekvis en ne regulaj intervaloj. Kiel celon la subtitolo mencias: *Neregula informilo pri fakaj fervojaj aferoj*. La sepa kajero aperis 1998. Tabelo de la publikigitaj titoloj troveblas sur paĝo ... post la tabelo de la ĉefpreletoj. Tiuj du tabeloj kun la tabeloj en *Historio*, p. 48 - 54 prezentas ampleksan gamon de la fakprelega agado flegita en IFEF.

Listo de kelkaj aŭtoroj, kiuj elstaris pro prelegoj aŭ verkado de artikoloj dum la epoko 1984 - 1999 (ni petas pardonon, se iu estas pretervidita):

d-ro I. BACSKAI (HU), W. BARNICKEL (DE), dr-o R. BOLOGNESI (IT), J. BULTMAN (NL), d-ro P. CHRDL (CZ), S. DAVID (CZ), G. DOLAPCIEV (BG), G. EGGENBERGER (CH), B. EHRLICH (DE), P. ENGEN (NO), M. FEIFICOVA (SK), J. FORTUNSKI (PL), J. GIESSNER (DE), E. GLÄTTLI (CH), G. GÖSSL (AT), I. GULYAS (HU), d-ro J. HALASZ (HU), D. HARTIG (DE), H. HAUGE (DK), d-ro H. HOFFMANN (DE), Jaromir IVANOVIC (YU), L. KOVAR' (CZ), P.J. KROGSTIE (NO), W. VAN LEEUWEN (NL), G. MAZAUD (FR), N.G. NARVALA (FI), I. NEDELCU (RO), J. NIEMANN (DK), L. NIEMANN (DK), E.H. OLSEN (DK), J. PATAY (HU), d-ro F. PHERSY (HU), Z. POLAK (CZ), E. QUIETENSKY (AT), J. RIPOCHE (FR), G. RITTERSPACH (DE), J. ROLLAND (FR), R. RUIZ (ES), L. SEKERES (YU), Herbert SONNTAG (AT), G. SREDIC (YU), M. STEFAN (RO), S. STOJKOVIC (YU), L. DE SUTTER (BE), H. SZMATLOCH-BORKOWSKA (PL), d-ro TERESNEU (RO), J. TOMISEK (CZ), F. TSCHOM (AT), E. TUDORACHE (RO), G. THUESEN (DK), J. WERNER (CZ), ZHU Ming-he (Ĉinio).

*J. Halász, D. Hartig, E. Glättli, H. Hoffmann, L. Kovář*

## 15-a ĉapitro

### IFEF kaj FISAIC

Ni rekomendas relegi la koncernan ĉapitron en la Historio, en kiu ni priskribis la evoluon de FISAIC kaj la rolon, kiun ludis IFEF en tio.

Unue ni denove konstata, ke la celoj kaj agado de IFEF ekzakte konformas al la celoj de FISAIC. Sed ni substreku, ke helpe de nia komuna lingvo ni pli facile, grandskale kaj intime kapablas alstrebi tiujn celojn, eĉ plenumi ilin. Kaj due ni ripetu, ke la helpo de IFEF ebligis al FISAIC la fondon de minimume dek el ĝiaj landaj sekcioj. Ankaŭ la kreo de la FISAIC-flago okazis laŭ propono de la germana IFEF-asocio GEFA jam en 1980. La nova flago flirtis la unuan fojon en la IFEF-kongreso en Regensburg 1981. Tiuj estas faktoj, kiuj tro ofte estas neglektataj, eĉ prisilentataj. Tio validis por la periodo antaŭ 1984 kaj bedaŭrinde plue validas.

La unua ekzemplo estas Pollando, kiu ja en 1973 aliĝis al FISAIC. Sed nur kiam en la 80aj jaroj la pola IFEF-asocio vigliĝis, eblis aranĝi la brilan IFEF-kongreson en Katowice 1987 sub aŭspicioj de FISAIC. En la postaj jaroj la tiamaj polaj funkciuloj kun IFEF-prez. GIESSNER kelkfoje estis akceptitaj de la ĝen. dir. de la Polaj Ŝtataj Fervojoj PKP.

Intertempe niaj francaj kolegoj sub prez. ROBIOLLE daŭre klopodis doni al Esperanto la staton de tria laborlingvo en FISAIC. Favorigis tion la tiama gvidanto de la franca FISAIC-sekcio, s-ro TRUEL, kiu publike eĉ nomis la esperantistojn ambasadoroj de FISAIC. Tio fine havis la ĝojigan rezulton, ke la franca IFEF-asocio estis rajtigita kaj komisiita, traduki ĉiujn korespondaĵojn, protokolojn, ktp. en Esperanton kaj inverse. Jam antaŭe la lingvo Esperanto havis la statuson, ke ĝi povis esti aplikata, se necese kaj se interpretisto estis je dispono. Tio fakte okazis dum la jubilea ĝenerala asembleo en Millau (FR) en 1992. Tie ĉeestis sufiĉe da esperantistoj el pluraj landoj, kiuj regis nek la francan, nek la germanan lingvojn. Spontanee la germana kolego GIESSNER kunlaboris kun la FISAIC-interpretisto, kaj tiel Esperanto funkciis senriproĉe ankaŭ dum la diskutoj. La aplikado de Esperanto en protokoloj havas aparte pozitivan sekvon en landoj, kies lingvoj ne vaste estas uzataj, ekz. Danio, Slovakio, ĉar tie oni tradukas el la Esperanto-tekstoj en la propran nacian lingvon.

Pro la politikaj kaj ekonomiaj situacioj en Bulgario kaj Rumanio la membreco de tiuj landoj en FISAIC praktike lamis aŭ ne povis ekesti. Tamen post fino de la epoko CEAUSESCU en Rumanio ekvivis Esperanto kaj refondiĝis en 1990 landa IFEF-asocio REFA en ĉeesto de hon. prez. GIESSNER. Ne daŭris longe, kaj REFA plifortiĝis sub sia energia prezidanto STEFAN, precipe en sia sidejo Braŝov. La direktoro de la tiea direkcio, dipl. inĝ. I. V. LEANCU, en 1992 starigis rumanan FISAIC-sekcion kaj transprenis ties gvidadon. GIESSNER subtenis tion per informoj kaj konsiloj. Baldaŭ Rumanio estis akceptita de FISAIC kiel nova membro.

Bulgario jam ekde 1983 estis membro de FISAIC, sed post la IFEF-kongreso 1984 neniel plu partoprenis aktive en iu aranĝo. Tamen la IFEF-asocio vivis. En 1997 FISAIC petis la hon. prez. de IFEF, ke li provu pere de la Esperanto-rilatoj en Bulgario revigligi la FISAIC-sekcion. GIESSNER sukcesis en printempo 1998 kun la prezidantino de la IFEF-asocio havi akcepton ĉe la ĝen. dir. de la Bulgaraj Ŝtataj Fervojoj. La rilatoj inter la landa FISAIC-sekcio kaj FISAIC estis normaligitaj, kaj la prezidantino de la IFEF-asocio, inĝ. V. KAMBUROVA, transprenis ankaŭ la gvidadon de la FISAIC-sekcio.

Jen ni menciuj, ke ankaŭ en ĉeĥio, Slovakio kaj Hungario la esperantistoj ludas gravan rolon en la FISAIC-sekcioj.

**Konkludo:** Ni povis priskribi valorajn rezultojn, kio ankaŭ ekkoneblas el la fakto, ke de post 1967 ĉiuj IFEF-kongresoj okazis sub aŭspicioj de FISAIC. Sed tio estas ombrumata de la ĝenerala situacio de IFEF, kiu ne permesas plene eluzi tiujn progresojn. Ni devas esti dankaj al niaj francaj kolegoj, kiuj prenis sur sin la temporaban taskon traduki la multnombrajn paperaĵojn, kiuj daŭre ekestas en tia granda internacia organizo kiel FISAIC. Kaj ni esperu, ke la fortoj de IFEF ankaŭ estontece kapablos konservi minimume la nunan staton.

*Ĝenerala prezidanto de FISAIC G. Schmit*

## La IFEF-kongresoj ekde 1984 ĝis 1999

N-ro	Jaro	Loko	Lando	LKK-prezidanto	Kongresanoj	El landoj
36	1984	Slančev Brjag	BG	Marinov	865	23
37	1985	Vejle	DK	H. Hauge	305	19
38	1986	Skopje	YU	Curkoski	715	18
39	1987	Katowice	PL	Rózankowski	422	18
40	1988	Perpignan	FR	Robiolle	553	19
41	1989	Salou	ES	Molina	534	23
42	1990	Hamar	NO	Krogstie	393	21
43	1991	Olomouc	CS	Chrdle	380	19
44	1992	Münster	DE	Giessner	342	22
45	1993	Cervia	IT	Bolognesi	469	24
46	1994	Krems a.d.Donau	AT	Scharf	401	22
47	1995	Pécs	HU	Gulyás	327	23
48	1996	Den Haag	NL	Bultman	295	21
49	1997	Košice	SK	Feifířová	194	21
50	1998	Aalborg	DK	H. Hauge	263	21
51	1999	Le Mans	FR	Ripoche	...	...

## Ĉefaj fakaj prelegoj kaj ekskursoj 1984-1998

Jaro	Loko	Lando	Okazo	Temo	Aŭtoro
1984	Slanĉev Brjag	BG	36. IFK	Stato kaj perspektivo de disvolvado de la fervoja transporto en P.R.Bulgario	Dolapĉiev
1985	Vejle	DK	37. IFK	Eksterordinaraj transportoj: Planado helpe de komputilo	Thuesen
1986	Skopje	YU	38. IFK	Komuna aktiveco de eŭropaj fervojoj en kadro de Societo Interfrigo	mag. Srediĉ
1987	Katowice	PL	39. IFK	Elektrizado de polaj fervojoj kaj pri konstruo de Ĉefa fervoja magistralo	Fortunski
1988	Perpignan	FR	40. IFK	Pri fervoja reto de grandrapidaj trajnoj al okcidento kaj sudokcidento de Francio (TGV Atlantiko)	Mazaud
1989	Salou	ES	41. IFK	Projekto pri fervoja kunligo per internacia ŝpuro inter Francio kaj Barcelono	3 aŭtoroj, trad. Guerrero
1990	Hamar	NO	42. IFK	La Centra Stacio de Oslo	Holøs trad. Engen/Krogstie
1990	Spa	BE	Eŭropa fervojista E-konf.	La eŭropa merkato 1992 kaj la fervojo	Hartig
1991	Olomouc	CS	43. IFK	TER - la projekto de Eŭropa Ekonomia Komisiono - Transeŭropa Fervoja Koridoro Nordo - Sudo	Chrdle
1992	Münster	DE	44. IFK	Merkato de trafikservoj Fakterminara laboro de IFEF Ekskurso al magnetglita fervojo Lathen	d-ro Bormann Hartig Hartig
1993	Cervia	IT	45. IFK	Ek al granda rapido,"ETR 500"	d-ro Boschin
1994	Krems	AT	46. IFK	Alpa Transita Trafiko	Tschom/ Sonntag
1995	Pécs	HU	47. IFK	La evoluo de la hungara trafiko ĝis la 1100jara datreveno de la patrujokupado	d-ro Halász
1996	Den Haag	NL	48. IFK	Historio de la trajntrafikreĝejo en Amsterdamo	Bultman
1997	Košice	SK	49. IFK	Historio kaj nuntempo de la Fervojoj de Slovaka Respubliko. Historio kaj evoluo de la fervojaj horarlibroj	Feifiĉová Giessner

1998	Aalborg	DK	50. IFK	La firma konekso trans la Sundo. Lumbild-retrorigardo al 50 IFK- oj	Lene Niemann Giessner
------	---------	----	---------	---	--------------------------

## II-a Sekcio

### Landaj asocioj

#### **Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio (AFEF)**

Menciindas unue, ke ekde la jaro 1967 prezidanto inĝ. Walter HUBER seninterrompe gvidas la asocion.

En junio 1986 la esperantistoj de Linz estis honoritaj per la Humaneca Medalo de la urbo Linz/Donau. En 1987 AFEF kune kun la Aŭstria Fervojista Sindikato aranĝis migran ekspozicion sub titolo *100 jarojn Esperanto, 150 jarojn fervojo en Aŭstrio*. Tiu ekspozicio informis dum la tuta jaro en preskaŭ ĉiuj gravaj stacioj. Akompana afiŝo (kopio en IF 1987.4) estis eldonita. AFEF-anoj kunlaboris samjare en simpozio *100 jarojn Esperanto* en la universitato Vieno.

En la 74a UK en Vieno 1992 la asocio okazigis altvaloran kontaktkunvenon kun fakaj prelegoj, krome tre interesan fakan ekskurson al la centra ranĝostacio de Vieno.

La kvaran fojon post la milito AFEF invitis IFEF-kongreson (la 46an en Krens) kun belaj folkloraj, muzikaj kaj ekskursaj programoj. La asocio regule aranĝas sian jarkunvenon en diversaj lokoj.

#### **Belga Esperanto Fervojista Asocio (BEFA)**

Jam de post 1971 ĝis nun Lucien DE SUTTER estas la motoro en sia landa asocio kiel ties prezidanto. En 1977 li estis elektita ĉefkomitatano de IFEF, kiun funkcion li plenumis ĝis 1997. En 1991 li fariĝis Kavaliro en la Krona Ordeno. En IFK Kosxice 1997 li estis nomumita Honora Membro de IFEF. Dum pli ol 20 jaroj li estris la Teknikan Komisionon de la belga FISAIC-sekcio, kaj okfoje reprezentis Belgion en ĝeneralaj asembleoj de FISAIC. En septembro 1998 li estis nomumita Honora Membro de FISAIC. De L. DE SUTTER grandskale dependis la vivo kaj agado de BEFA. Grava kaj granda streĉo lia estis la 35a IFK en Oostende. La asocio regule aranĝas kunvenojn por la membroj.

#### **Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (BAEF)**

Post la morto de la longtempa prezidanto Horace BARKS en 1983 oni elektis Alan BURGESS prezidanto. Sed la membraro pli kaj pli malkreskis, tiel ke en 1992 okazis la lasta kunveno. En 1993 la asocio oficiale ĉesis ekzisti. La enhavon de la kaso oni donis al IFEF. La lasta sekretario, Frank CURTIS, aniĝis en la franca asocio por konservi la IFEF-membrecon kaj personan kontakton.

*W. Huber*

*L. de Sutter*



### **Fervojista Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio (FSBEA)**

En la tempo de septembro 1984 ĝis 1996 la asocio estis gvidita en periodoj de po tri jaroj de Georgi LITOV, Enjo K. ENEV kaj Petrana LALOVA. De post 1996 gvidas ing. Veselka KAMBUROVA. En 1984 la asocio havis 550 membrojn en 11 lokaj societoj. Ĉiujare estis aranĝita konferenco. En la jubilea jaro 1987 LITOV organizis grandan ekspozicion en Sofia, pri kiu raportis i.a. Bulgara Televido. Miloj da homoj vizitis ĝin.

Dum la dua periodo de prez. ENEV la asocio tre suferis pro la tiama ĝenerala malpliboniĝo de la ekonomia kaj socia situacioj. Tamen la estraro majstris la financajn kaj organizajn malfacilaĵojn, sukcesis ĉiujare aranĝi membrorenkontiĝon kaj eĉ bulgaraj membroj partoprenis regule en IFEF-kongresoj. Neeviteble disfalis kelkaj lokaj societoj, kiujn oni sub prez. LALOVA grandparte restarigis. Oni helpe organizis kursojn, parolado-rondojn kaj ekspoziciojn.

La ekonomia mizero negative influis ankaŭ la internaciajn kontaktojn. Komplete lamis la rilatoj al FISAIC. Sed en 1997 FISAIC petis helpon de IFEF per ties honora prezidanto GIESSNER. Tiu en majo 1998 sukcesis kun prez. KAMBUROVA kaj helpe de ĝen. dir. de BDZ', V. DUNĈEV, restarigi rektajn rilatojn al FISAIC, tiel ke bulgaraj reprezentantoj partoprenis jam en la ĝenerala asembleo de FISAIC en septembro 1998.

### **Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (FSĈEA)**

Ĝis 1988 prezidis post kolego KASPAREĈ kol. F. STRUMINSKY. De post tiam gvidas Jindrich TOMIŠEK. Tiam la asocio havis 124 membrojn, el kiuj 87 membroj de IFEF. Inter ili estis kelkaj slovakoj.

Venis la revolucio de 1989 kun disfalo de Ĉeĥoslovakio en la du ŝtatojn Ĉeĥa Respubliko kaj Slovaka Respubliko. Ekmalkreskis la membraro pro la ĉie konataj kaŭzoj: pli malmulte da fervojistoj, ekonomiaj malfacilaĵoj. Nedaŭran interrompon de tiu tendenco donis la tre sukcesa IFK en Olomouc (1991). Tie Jaromir BABIČKA elektiĝis Honora Membro de IFEF. Li tre suferis pro sia agado por Esperanto dum la komunista tempo, eĉ en radium-minejo.

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj oni aranĝis ĉiujare du landajn renkontiĝojn, printempe kaj aŭtune. En muzeo en Česká Třebová estis fondita Esperanto-fako, kiun prizorgas Jir'í PIŠTORA jam de kelkaj jaroj. Dumtempe kunlaboris en la Faka Komisiono kol. DAVID, kaj krome ing. Ladislav KOVÁR' (vidu ĉap. 14an), kiu ankaŭ redaktis la *Fervojfakajn Kajerojn*.

*E.K. Enev*

*V. Kamburova*

*J. Tomišek*

Malgraŭ vaststila varbado kaj informado ne eblis haltigi la malkreskon de la membronombro (en 1998 estis 68, el kiuj 34 IFEF-membroj). FSĈEA tamen plifortigis siajn varbklopodojn. Precipe oni intensivigis la kunlaboron kun la landa FISAIC-sekcio, kiu sendis oficialan reprezentanton al festo en la ĉefstacio de Prago okaze de la 90a naskiĝtago de Honora Membro BABIČKA.

La asocia membro d-ro Petr CHRDLÉ kiel iama altranga fervojisto de kelkaj jaroj funkciigas eldonejon kaj vojaĝentreprenon. Li kunlaboras kun la fervojo kaj la FISAIC-sekcio. Por ĝi li jam dufoje organizis internaciajn konkursojn por filmo kaj video. Li ankaŭ organizis IFEF-skisemajnon. En 1998 CHRDLÉ estis elektita estrarano de UEA.

J. TOMIŠEK en 1997 elektiĝis anstataŭanto de la IFEF-ĉefkomitatano, en 1998 ĉefkomitatano mem.

### **Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA)**

En 1984 fondiĝis la Huhehota Fervoja Administracia Esperanto-Asocio kiel branĉo de Interna Mongolia Esperanto-Asocio. Prezidanto estis dipl. inĝ. LI Sen. Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) subtenis la novan asocion. Ĉina Radio Internacia disaŭdigis, la Internacia Fervojisto publikigis la fakton, la IFEF-prezidanto gratulis.

Sekvis kursoj en multaj lokoj kaj baldaŭ ekzistis fervojistaj grupoj en 16 urboj. Okaze de la unua Esperanto-Kongreso de ĈEL estis fondita en aŭgusto 1985 Unuiĝo de Fervojistaj Esperanto-Grupoj (UFEG) sub prezidanto LI Sen. La ĉinaj grupoj aktive partoprenis en la fervojista kontaktkunveno de la 71a UK en Beijing (Pekino). En la 72a UK en Varsovio LI Sen partoprenis kaj ĉeestis la kontaktkunvenon. Ekde tiam ĉiujare okazis tutlandaj jarkunvenoj. En 1988 IFEF akceptis la aliĝon de la ĉinaj grupoj kiel nova landa asocio.

Grava evento fariĝis la 13a de marto 1993. Dum kunveno organizita de ĈEL fondiĝis Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio (ĈFEA), denove sub gvidado de LI Sen. Ĉeestis fervojistoj el 8 grandaj urboj. Membroj de ĈFEA de tiam partoprenis en tutlandaj kongresoj kaj en la Unua Azia Esperanto-Kongreso. Ĉina delegito partoprenis la 50an IFK en Aalborg. Dipl. inĝ. LI Sen intertempe ricevis multajn gravajn honorigojn de la Ĉina Ŝtato, Esperanto-organizaĵoj kaj sciencaj institucioj.

### **Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

DEFA ĉiam klopodis teni kiel eble plej aktivan agadnivelon, ĉu interne per grupkunvenoj, ĉu eksteren per partopreno en la libertempa kaj faka laboroj de la fervojo. Certa regreso rilate al membronombro kaj nombro de grupoj ne estis evitebla. En 1999 ekzistas tri grupoj, el kiuj la Kopenhaga kunvenas ĉiu-semajne. La membronombro estas 33. Ĉiuj estas IFEF-membroj. En la monata periodaĵo de la libertempa organizo de la danaj fervojoj konstante aperis artikoloj de DEFA.

*Li Sen*

*H. Hauge*

Dum preskaŭ la tuta periodo Henning HAUGE estis prezidanto de la kultura fako de la libertempa organizo, kaj je sia demisio en 1995 li ricevis honorpokalon.

Ĉiama tasko estas aktualigi la Esperanto-klarigojn en la fervoja horaro, kiuj aperas ekde 1961. Kiam la dana fervojo entreprenis tradukon de *RailLexic* al la dana lingvo, DEFA eniris la oficialan skipon. Kiam okazis la konstrulaboroj pri la firma konekto trans Grandan Belton, DEFA tradukis broŝuron pri tio, kaj la fervojo eldonis Esperanto-version.

DEFA aranĝis du IFEF-kongresojn, nome en Vejle 1985 kaj en Aalborg 1998 (50-an jubilean). Tiel DEFA kvinfoje gastigis IFEF-kongreson. Nelacigebla Erna HAUGE finredaktis kaj DEFA eldonis la *Fervojfakajn Kajerojn* de IFEF, kiuj ĝis 1998 aperis en sep numeroj.

En januaro 1993 *DEFA-bulteno* ŝanĝis sian nomon al *Dana Fervojisto* por konformiĝi al la instigoj, ke la landaj organoj nomiĝu simile al *Internacia Fervojisto*.

En 1998 dum la 50-a IFK estis nomumitaj Honoraj Membroj de DEFA Erna HAUGE kaj Anders KLAUSEN. Krome Erna HAUGE, kiu de 1995 ĝis 1998 estis IFEF-redaktorino, elektiĝis Honora Membro de IFEF. Post grava malsano Erna HAUGE mortis la 15an de junio, baldaŭ post la kongreso.

## **Estonio**

Estonio aliĝis kiel landa asocio de IFEF en IFK Hamar 1990 sub gvidado de Johannes PALU, kiu bedaŭrinde mortis post malmultaj jaroj. Sekvis kiel prezidanto Harry KOPPEL en Tallinn. La tre malfavora ekonomia stato en Estonio dekomence malebligis evoluon de la eta asocio. Oni nur malregule kunvenas kaj ĉefe kadre de Esperanto-Asocio de Estonio.

## **Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj (ESFF)**

ESFF estas unu el la landaj asocioj de IFEF, kiuj fariĝis viktimo de la nuntempo. Ĝia longtempa prezidanto, mag. Nils Gösta NARVALA, gvidis ĝin de 1961 ĝis sia morto en 1989. Li elstaris pro fakaj prelegoj, estis daŭra IFEF-komitatano kaj tre aktive kunlaboris en la Terminara Komisiono. De 1989 ĝis fino de 1995 la gvidadon de ESFF transprenis Yrjö HILTUNEN, kiu jam dum multaj antaŭaj jaroj ludis gravan rolon en sia landa estraro. En 1995 la asocio havis nur ankoraŭ 9 membrojn, nur emeritulojn. La malfacilaĵoj fariĝis tiom grandaj, ke nenio alia restis, ol malfondi la asocion. Tio okazis la 31an de decembro 1995.

*Y. Hiltunen*

### **Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA)**

Komence de la raport-periodo la asocion gvidis juna Gérard HORN ĝis 1987, kiam li subite forpasis en aĝo de 41 jaroj. Dum mallonga tempo li ankaŭ gvidis la Junularan Sekcion de IFEF. Poste transprenis la prezidantecon ĝis 1996 Pierre ROBIOLLE, kiu jam pli frue estis gvidinta la asocion. Dum lia gvidado la membronombro de FFEA konsiderinde kreskis. Li longtempe estis IFEF-komitatano kaj kunlaboris en la Terminara Komisiono. Post li transprenis tiun funkcion Jean RIPOCHE, kiu krome en 1997 elektiĝis ĉefkomitatano kaj en 1998 IFEF-redaktoro.

Pro multflankaj meritoj ROBIOLLE flanke de la Ŝtato ricevis la Palmordenon kaj arĝentan medalon de la ministro pri sporto kaj junularo. Li kaj Germaine LEMONNIER estis nomumitaj Honoraj Membroj de FFEA, LEMONNIER krome Honora Membro de IFEF. ROBIOLLE ankaŭ ricevis oran medalon de FISAIC. LEMONNIER ricevis oran medalon kaj RIPOCHE arĝentan medalon de la franca FISAIC-sekcio.

En 1988 FFEA la trian fojon transprenis la taskon aranĝi IFK-on, ĉi-foje en Perpignan. Ĝi havis grandan publikan eĥon pro ellaso de kelkcentoj da aerbalonoj. Precipe gravaj estis plurjaraj klopodoj de FFEA por enkonduki Esperanton kiel laborlingvon en FISAIC. Kolegoj ROBIOLLE kaj WALLERAND kun la tiama gvidanto de la franca FISAIC-sekcio, s-ro TRUEL, atingis, ke ekde 1989 la Internacia Lingvo havas statuson de tria laborlingvo. Precipe ĝi estas uzata por tradukado de protokoloj kaj dokumentoj, kiun laboron daŭre prizorgas kolegoj de FFEA. Tio tre utilas por landaj asocioj, kies lingvoj ne vaste estas uzataj. Esperanto ankaŭ povas esti uzata por interpretado dum kunvenoj, se sufiĉe da esperantistoj ĉeestas. Tio ekz. okazis dum la ĝenerala asembleo en Millau (FR) en 1992.

### **Fakgrupo Fervojistoj-Esperantistoj de Germana Regna Fervojo**

Ĉar tiu fakgrupo ne estis prezentita en la Historio 1909-1984, ni koncize skizas ĝin ekde 1965. Ĝis tiam ekzistis nur personaj kontaktoj inter kelkaj kolegoj diverslokaj. GEFA neoficiale membrigis ilin kaj provizis ilin tra kol. Herbert KINZEL per sia *Bulteno* kaj *Internacia Fervojisto*. Kiam tiuj broŝuroj ne plu alvenis rekte, ili atingis sian celon helpe de la hungaraj kolegoj. Eĉ personaj kontaktoj inter la GEFA-prezidanto GIESSNER kaj KINZEL kaj aliaj iom post iom funkciis. Krome KINZEL partoprenis en IFK: Helsinki (60), Budapeŝto (62).

**1965** Fondo de Centra Laborrondo Esperanto en kadro de Kulturligo de GDR, sekve oficiala tolero, poste eĉ subtenado. En la sekvaj jaroj kreskis la membraro kaj ekestis sporadaj kontaktoj.

*P. Robiolle*

*A. Meinel*

**1977** La 16an de majo fondo de la Fakgrupo Fervojistoj-Esperantistoj en Berlino kun 16 fervojistoj. Prezidanto Achim MEINEL. Unu jaron poste elekto de laborkomisiono.

**1979** Unua jarkunveno kun gastoj de ĈSD. Aperis la unua numero de *Fervojistaj Novaĵoj* (FN red. H. JASMANN, aperis ĝis n-ro 35 en 1992). Ekde 1979 regula partopreno de du delegitoj en jarkunvenoj de socialismaj landoj kaj inverse.

**1980** Komenciĝis kaj daŭris terminara laboro en jarkunvenoj kaj ekz. per vortlistoj en FN surbaze de la *Terminaro de BLONDEAU* (prilaboris H. THEURICH).

**1981** Lingvokomprenaj eksperimentoj kun 83 studentoj en la Trafika Altlernejo Dresdeno (gvidis H. HOFFMANN). En 1982 13 membroj en IFK Balatonfüred (HU).

**1983** H. HOFFMANN ekzameniĝis en la lingvo Esperanto por fariĝi doktoro-inĝeniero. (Tio okazis nur unu fojon en GDR).

**1984** IFK en Slančev Brjag (BG) donis okazon de kontaktoj kun ĉiulandaj kolegoj. Okaze de ekspozicio en Centra Esplorinstituto de Trafiko en Berlino oni prezentis esperantaĵojn.

**1987** Enkonduko de fakaj prelegetoj en jarkunvenoj por stimuli la membrojn al propra agado.

**1988** En IFK Perpignan aliĝo kiel landa asocio de IFEF. Unuan fojon ano de FFE, Achim MEINEL, oficiale rajtas partopreni en okcidenta IFK.

**1989** Tri membroj povis partopreni en IFK Salou (ES) kaj unu membro en GEFA-jarkunveno en Verden. Fine de la jaro post politikaj eventoj en GDR ekestis liberaj vojaĝeblecoj por ĉiu.

**1990** Per aparta kuŝvagono 29 kolegoj partoprenis en IFK Hamar (NO). Eksterordinare bona prizorgado flanke de LKK por kongresanoj el iamaj socialismaj landoj.

**1991/92** Iom post iom la privata kaj profesia vivoj de multaj fakgrupanoj ŝanĝiĝis. FFE nun agadis en la kadro de Sociala Organizo de DR (paralele al DB). FFE kunorganizis belegan postkongreson post IFK Münster en la orienta parto de Harco. Sekvis la lasta jarkunveno de FFE-DR en Schmannewitz en novembro 1992.

**1993** La unuan de januaro unuiĝo de FFE kaj GEFA. Ekde tiu dato ekzistas nur unu germana landa asocio en IFEF.

### **Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA)**

**1984** Membronombro 473, RIEHN sekretario, 6 kursoj sen menciinda rezulto, dulingva glumarko pri protektado de arbaroj eldonita. J. GIESSNER ricevis la meritkrucon de la Federacia Respubliko Germanio. En UEA-jarlibro tutpaĝaj anoncoj pri DB kaj TRANSPRID. GEFA-Bulteno aperis kvinfoje jare.

**1985** G. RITTERSPACH gvidanto de TK kaj sekr. de FK, D. HARTIG redaktoro de *TeKu*. GIESSNER prezentis Historion de IFEF. Li estis LKK-ano de UK Augsburg, gvidis tie la Nacian Vesperon kaj estris servo-ĝiĉeton de DB. Li redaktis specialan *Bultenon* pri 75 jaroj de la germana fervojista movado.

**1986** GEFA helpe de D. HARTIG eldonis *Korespondan Kurson* kun lernolibro kaj kasedo (159 venditaj), krome varbilon kun foto de ICE, en DB-prospekto *Inter-Rail* daŭre ofertita la *Pasporta Servo*. Ĉiujare jarkunveno en alia urbo.

**1987** Estraro: GIESSNER, GRASS, RIEHN. GIESSNER prezentis de li tradukitan libron *La lastaj infanoj de Oldrovalo* en UK Varsovio okaze de la jubilea jaro.

**1988** En IFK Perpignan RITTERSPACH prezentis la novan terminaron. HARTIG ricevis oran medalon de FISAIC. Aŭtune seminario por kursgvidantoj en Rantum, 113 artikoloj pri agado de GEFA-anoj en la gazetaro.

**1989** *Terminaro* aĉetebla, dua parto de *Koresponda Kurso* aperis, RÖSEMANN demisiis el funkcio de IFEF-sekretario, presisto de *Bulteno* mortis, alia presejo. La politiko de la fervojo pli kaj pli kaŭzis malfacilaĵojn. En novembro falo de la Berlina Muro.

**1990** En januaro terura bato por GEFA kaj IFEF: mortis Gernot RITTERSPACH en aĝo de 60 jaroj. En IFK Hamar li postmorte ricevis la oran medalon de FISAIC. Jarkunveno kun BE, GB, FR, NL en Spa (BE), pri du tieaj koncertoj eldonita muzikkasedo. En IFK Hamar GIESSNER post 22 jaroj demisiis el funkcio de IFEF-prezidanto, nomumiĝis Honora Prezidanto.

**1991** 386 membroj. Ankoraŭ du germanaj socialaj organizoj, sekve du germanaj landaj asocioj en IFEF. Jam de du jardekoj la emerituloj ĉiujare havas apartan kunvenon. La prezidanto oficiale partoprenis en la jarkunveno de la Fakgrupo (DR).

**1992** 44a IFK Münster kun grandegaj malfacilaĵoj en planado pro la ĝenerala situacio en Eŭropo. Pozitiva publika eĥo, altvalora programo kun abunda uzado de Esperanto, postkongreso en orienta Harc-montaro. Estis reeldonita dulingva glumarko *Esperanto - Deine zweite Sprache* (Esperanto-via dua lingvo).

**1993** 1.1.1993 unueca GEFA. 40 jarojn *Bulteno*, kies redaktado iris al GIESSNER ekde 2/93. Gi aperis de tiam nur kvarfoje jare por ŝpari kostojn. *La lastaj infanoj de Oldrovalo* el Esperanto tradukita al ĉina lingvo (Vd. 1987). HARTIG prezentis *Nacian Terminaron G-E*. Aperis MK *Kantoj de l'popolo* (GIESSNER). Estraro: GIESSNER, RÖSEMANN, RIEHN, MEINEL.

**1994** Spite al ĉiuj klopodoj la membronombro daŭre malkreskis. *Bulteno* ricevis nomon *Fervoja Esperantisto* (tradicia el fondotempo). Komenciĝis kunlaboro de GEFA en terminologiaj kunvenoj de UIC, projekto *RailLex*. Aktivaj kunlaborantoj en FK de IFEF: d-ro HOFFMANN, HARTIG. Nova estaro: GIESSNER, RÖSEMANN, RIEHN, JASMANN.

**1995** Post privatigo de la fervojo (nun DB AG) tre malklara estonteco de la kulturaj grupoj. *Fervoja Esperantisto* nun kompostita per komputilo de HARTIG. JASMANN starigis agadplanon. HARTIG kreis 6 informilojn/varbilojn okpaĝajn.

**1996** En IFK Hago (NL) Willi BARNICKEL fariĝis Honora Membro de IFEF. Nova MK *Famaj kantoj por belaj horoj* (GIESSNER). Membroj 308, GEFA havas ankoraŭ du komitatanojn.

O. Rösemann

1997 1. 1. 1997 fondiĝis *Stiftung Bahn-Sozialwerk* (Fondaĵo Fervoja Sociala Organizo). Nun klara situacio por ni pli favora. *Fervoja Esperantisto* 45jara, ekde n-ro 3/97 redaktas kaj produktas ĝin HARTIG.

1998 GEFA ekzistas 50 jarojn post la milito. Membroj 244. 1999 GEFA ŝanĝis sian germanlingvan nomon 1.1.1999 al *Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung*. Pro la disbatado de la fervojo en multajn privatajn entreprenojn kaj filinojn apenaŭ eblas trovi interesulojn aŭ novajn membrojn.

### **Hispana Esperanto Fervojista Asocio (HEFA)**

La asocio estas gvidata de R. RUIZ. Gi aranĝis en 1989 tre sukcesan kongreson en Salou, kie elstaris belaj ekskursoj kaj folkloro, aparta celebrado de la 80a jubileo de la fervojista movado kaj interesega forumo, kie altrangaj fervojistoj respondis la demandojn de kongresanoj. Dum kelka tempo R. DEVIS kunlaboris en la terminara agado de IFEF.

### **Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA)**

La 34a brila IFEF-kongreso en Balatonfüred (1982) havis pozitivajn sekvojn en la postaj jaroj. La fervojistoj grave kontribuis en la aranĝado de UK Budapeŝto en 1983. Entute la fervojista movado vigliĝis, la membronombro stabiliĝis.

István GULYÁS ekde 1985 prezidas la tiaman Fervojistan Fakon de HEA (nun HFEA). Li estas komitatano A de UEA de 1976 kaj vicprezidanto de IFEF de 1988. Komence de la 90aj jaroj li transprenis gravegan taskon kiel peranto en terminologiaj rilatoj inter IFEF - MÁV - UIC.

Sed ankaŭ unu el la plej laboremaj IFEF-anoj troviĝas inter la hungaraj estraranoj, nome ties sekretario János PATAY. D-ro József HALÁSZ dum longa tempo intensive agis en la estraroj de HEA kaj HFEA. Longtempa komitatano de IFEF, de 1993 li gvidis la Fakan Komisionon ĝis 1998 kaj estras la landan terminaran agadon.

HFEA ludis gravan rolon en la terminologia kunlaboro kun UIC (komp. 14an ĉapitron).

Malgraŭ oftaj ekonomiaj malfacilaĵoj la landa organo *Hungara Fervojista Mondo* aperadas ekde 1957. Ĝi akiris internacian renomon kiel elstara organo de la fervojista movado. En la 80aj jaroj membrokulmino estis mil.

La grandaj ŝanĝoj de 1989/90 ankaŭ en Hungario havis la konatajn sekvojn: perdo de laboro, inflacio, profitemo, perdo de kunvenejoj, malkresko de membronombro. Tamen HFEA ĉiujare aranĝis *Fervojistan Tagon* kaj kelkfoje gastigis kunvenojn de la IFEF-estraro. En la 70aj jaroj danke al la klopodoj de la esperantistoj Hungario membriĝis en FISAIC. Kaj danke al la klopodoj de HFEA nun jam ok branĉoj apartenas al la hungara FISAIC-sekcio.

*J. Patay*

En majo 1995 HFEA denove gastigis la 47an IFK-on en Pécs, kun belega programo kaj tre sukcesa postkongreso.

En 1996 HFEA perdis sian plej elstaran membron, d-ron István BACSKAI en aĝo de 88 jaroj.

Por ĝenerale adaptiĝi al necesaj leĝaj ŝanĝoj la asocio transprenis en 1996 novan juran statuson sub nomo Hungara Fervojistista Esperanto-Asocio.

### **Itala Fervojistista Esperanto-Asocio (IFEA)**

En 1984 gvidis kav. Germano GIMELLI (prez.) kun d-ro Romano BOLOGNESI (sekr.). Kvin jarojn poste en IFK Salou d-ro Romano BOLOGNESI elektiĝis IFEF-sekretario, kiun funkcion li havis ĝis 1998. En 1991 estis aranĝita dusemajna ekspozicio en Bologna kun titolo *La mondo en poŝo*. Kvinfoje BOLOGNESI prelegis pri *La lingvoj en la mondo*. En 1993 IFEA la kvaran fojon invitis IFK al Cervia sub LKK-prez. d-ro BOLOGNESI. Menciindas, ke ĉi-okaze tri ZEOJ (vidu Ĉap. 11an) estis inaŭguritaj. En 1995 kav. Pasquale CECI transprenis la prezidantecon. G. GIMELLI fariĝis Honora Prezidanto de IFEA.

Ekde 1994 kvinfoje estis aranĝita *Kultur-Semajno* en Plan Val Gardena kun valoraj prelegoj. Tie tri foje kunvenis la IFEF-estraro. En 1996 la grupo Verona festis sian 50-jaran ekzistadon. En IFK Aalborg (1998) d-ro BOLOGNESI elektiĝis IFEF-prezidanto.

### **Japana Esperantista Ligo Fervojistista (JELF)**

Ĝis 1987 la asocion gvidis prez. KUSUDA kaj sekr. NOBUKI. Sed dum 1986/87 la Nacia Fervojo estis disbatita en 7 privatajn fervojojn. Inter la fervojistaro estiĝis ĥaoso. En 1988 restis 3 aktivaj membroj. Oni devis komenci kvazaŭ de nulo. Nova prezidanto OSIOKA, sekr. restis NOBUKI. Oni komencis kontaktiĝi kun la ĉina IFEF-asocio, ekz. japanaj membroj vizitis Internan Mongolion kaj aliaj partoprenis en la 5a Pacifika Kongreso 1992, tie eĉ aranĝis kontakt-kunvenon kun ĉinoj. Japanaj kolegoj ankaŭ ĉeestis en la Unua Azia Esperanto-Kongreso en 1996. JELF en 1997 havis 20 IFEF-membrojn. La Japana Esperanto-Instituto planas eldoni novan vortaron E-J, en kiu flanke de JELF kunlaboras kol. YAMAMOTO, por certigi ĝustecon de la fervojfakaj esprimoj. Neregule du- aŭ trifoje jare aperas *Informilo de JELF*, kiu ĵus atingis n-ran 100.

### **Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE)**

JAFE estas asocio, kiu multe suferis pro la konataj eventoj en Bosnio. Tiu civitana milito fine kaŭzis, ke la Ŝtato Jugoslavio disfalis kaj ekestis kelkaj novaj ŝtatoj memstaraj, el kiuj iom post iom aliĝis novaj landaj asocioj al IFEF. En restanta Jugoslavio JAFE ankoraŭ havas 8 grupojn kun ĉirkaŭ 300 membroj, el kiuj 20 estas IFEF-anoj. Oni kontentige fake kunlaboras en IFEF (SREDIĆ / SEKEREŠ). Prezidanto dum la tuta periodo ĝis 1997 estis mag. Gvozden SREDIĆ, samtempe redaktoro de

*N. Nobuki*



*Jugoslavia Fervojisto* kaj IFEF-komitatano, Honora Membro de IFEF kaj posedanto de ora medalo de FISAIC. Nun li ankaŭ fariĝis Honora Prezidanto de JAFE. Kiel posteulo estis elektita Miodrag DIMITRIJEVIĆ.

Regule aperis la organo *Jugoslavia Fervojisto*. JAFE ankaŭ ofte aperigis tradukitajn resumojn el fakaj prelegoj en revuo de la fervojo. El la multflanka asocia agado ni menciuj:

Aperis nacia terminaro kun 10.200 terminoj surbaze de LG IV UIC. En organo *Pruga* (Beograd) dum 18 monatoj aperis lingvokurso kaj krome artikoloj pri diversaj lingvotemoj. Aperis kvinlingva terminaro pri kombinita trafiko prezentita en IFK Aalborg (1998). Diversloke aperis komunikajoj kaj artikoloj pri historio de Esperanto, fervojo kaj terminologio. Aŭtoro aŭ kunaganto ĉefe estis SREDIĆ. En 1986 JAFE la trian fojon okazigis IFEF-kongreson (Skopje) kun favora eĥo kaj inaŭguro de Esperanto-strato. Oni regule organizas kursojn. En marto 1998 la fervojista societo en Beograd okazigis *Danuban Rendezuon* de la internacia revuo *Literatura Foiro*.

### **Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA)**

Nuna KFEA ekestis sekve de la konataj eventoj en la civitana milito en Jugoslavio. Kroataj fervojistoj esperantistaj jam en la dudekaj jaroj konsiderinde agadis en la internacia fervojista movado kaj en la kvindekaj jaroj grave kontribuis al ekesto de la fervojista movado (tiam JAFE) en Jugoslavio (komp. *Historion* p. 11 - 14 kaj 54). La anoj de la nuna asocio jam tre aktivis en la okdekaj jaroj - tiam ankoraŭ en kadro de JAFE - kaj fondis la asocion 1991 post ekesto de memstara Ŝtato Kroatio. En la IFK Münster 1992 KFEA aliĝis al IFEF sub gvidado de prezidantino Marica BRLETIĆ.

La asocio posedas riĉenhavan bibliotekon kaj ekspozician materialon pri la IFEF-kongresoj ekde 1954. Kun la kroata FISAIC-sekcio kaj la Kroataj Fervojoj (HZ) ekzistas bonaj rilatoj. Membroj en IFEF estas 20.

### **Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda (FERN)**

Malgranda landa asocio de IFEF kun multaj aktivecoj. Gis la jaro 1991 FERN organizis komunajn jarkunvenojn kun BEFA, poste proprajn. En 1988 FERN partoprenis en *Trilanda Markola Fervojista Aranĝo*. FERN-anoj ofte partoprenis en francaj kaj germanaj jarkunvenoj, en 1990 ankaŭ en la *Eŭropa Fervojista Esperanto-Konferenco* en Spa (BE). En 1996 FERN aranĝis la 48an IFK en Hago kun elstara programo sub LKK-prez. Jan BULTMAN. La eta LKK devis labori sen multe da subteno flanke de la fervojo aŭ landa FISAIC-sekcio. En 1992 aperis la 500a numero de FERN-organo

*G. Sredić*

*M Brletić*

*Bultman - Schevemacher*

*Fervojisto*, ĉefe danke al Wim VAN LEEUWEN kaj JAN POPTIE.

En 1990 la prezidanto de FERN, Jan BULTMAN, estis elektita anstataŭanto de la IFEF-ĉefkomitatano. En 1991, post IFK Olomouc, W. VAN LEEUWEN en solena kunveno povis transdoni al la vidvino de la iama IFEF-prezidanto la dokumenton de la IFEF-estraro, laŭ kiu Kornelius G. DE JONG postmorte estis nomumita Honora Prezidanto de IFEF. La grupo UNFEG en Amsterdamo la 28an de marto 1995 post 63 jaroj da ekzistado devis likvidi sin mem pro manko de membroj kaj salono. La membronombro de FERN reduktiĝis al 25 en 1998.

### **Norvega Esperanta Fervojista Asocio (NEFA)**

Prezidanto de NEFA ekde 1962 ĝis 1992 estis Per Johan KROGSTIE. De post tiam gvidis Rolf BERGH. KROGSTIE fariĝis vicprezidanto, krome elektiĝis prez. de la Norvega Esperantista Ligo (NEL). Per ENGEN: Honora Membro de IFEF (1988), Honora Prezidanto de IFEF kaj ora medalo de FISAIC, Ordeno pro Merito de NEL; Odd KOLBREK: Kavaliro de dua klaso (1987); P. J. KROGSTIE: Komandoro de dua klaso (1991); R. BERGH, K. BYE, P. ENGEN: Kavaliro de dua klaso (1992).

En 1986 KROGSTIE verkis *Gvidlibron pri la fervoja muzeo en Hamar* en lingvoj norvega, angla, germana kaj esperanta. Ĉiuj objektoj de la muzeo portis ŝildojn en la menciitaj lingvoj. Helpe de Esperanto-kolegoj la gvidlibro estis tradukita al 12 aliaj lingvoj.

Ofte NEFA organizis aŭ partoprenis diversajn internaciajn Esperanto-aranĝojn, ekz. 1986 en Otta (NO), 1987 en Hamar (NO), 1988 en Ry (DK), 1990 en Drammen (NO), 1991 en Bergen (NO) dum UK, 1993 en Helsingør (DK), 1996 en Västerås (SE). Ĉiam dum tiuj kunvenoj okazis fakaj kaj aliaj prelegoj.

En 1990 NEFA invitis la 42an IFEF-kongreson al Hamar. En tiu IFK ĉirkaŭ la duono de la kongresanoj venis el orientaj landoj, ĉar kelkaj vagonoj el tiuj landoj rajtis veturi rekte ĝis Hamar. LKK krome organizis proksimume 3.000 senpagajn manĝojn. La fervojo disponigis du ekskurstrajnojn al Röros kaj Lillehammer. Elstara koncerto en la katedralo. En 1997 laborgrupo sub gvidado de P. ENGEN finis la norveglingvan tradukon de LG IV, sed poste ĝi ne povis esti eldonata pro manko de mono kaj ĉar la fervojo ne helpis.

### **Landa Fervojista Sekcio de Pola Esperanto-Asocio (FS-PEA)**

Post kelkjara silentado kaj multaj klopodoj flanke de IFEF revigliĝis la movado en Pollando. La 5an de junio 1982 refondiĝis la Fervojista Sekcio de PEA en Świdnica sub gvidado de C. HOLZ en ĉeesto de 35 fervojistoj. Ekzistis kluboj en pluraj urboj. Baldaŭ la klubo en Tarnowskie Góry kaj la regiono de Katowice fariĝis gravaj centroj.

*R. Berg*

Transprenis la prezidantecon W. RÓZANKOWSKI por kelkaj jaroj, poste s-ro F. KOTULSKI kaj fine s-ino M. FEDOROWICZ.

En la jubilea jaro de Esperanto (1987) la asocio sukcesis aranĝi la IFEF-kongreson en Katowice. Ĝi havis kelkajn kulminojn kaj fortan publikan eĥon helpe de la redaktoro de la Esperanto-fako en Radio Warszawa. Elstaris sinfonia koncerto elsendita al tuta Eŭropo. Tre favore subtenis la preparadon kaj aranĝadon de la kongreso la direktoro de la direkcio Katowice, inĝ. A. RODAK, kiu estis membro de la Honora Patrona Komitato de IFEF.

Kelkfoje, laste en 1993, la asociaj gvidantoj sukcesis aranĝi akceptojn ĉe la ĝenerala direktoro de PKP en Warszawa, ĉiam en tre afabla atmosfero, sed poste sen rezultaj faktoj.

Regule la asocio okazigis jarajn konferencojn kun valoraj programoj. Ankaŭ la pola asocio suferis por la ĉie konataj kaj samaj kaŭzoj. Precipe en la naŭdekaj jaroj ĝi perdis multajn membrojn sen havi eblecon, trovi novajn adeptojn.

### **Rumana Esperanto Fervojista Asocio (REFA)**

La rumana asocio de IFEF (akceptita en IFK Avignon 1969) jam komence de la 70aj jaroj pro politikaj kaŭzoj ne plu povis aktive agadi en IFEF. Tamen en Rumanio daŭris la vivo en kelkaj lokoj, kaj eĉ okazis kursoj.

En IFK Hamar (1990) aperis 3 rumanaj gekolegoj. Jam en la sama jaro la 11an de novembro okazis fondkunveno de REFA en Sinaia en ĉeesto de J. PATAY (HU) kaj la honora prezidanto de IFEF GIESSNER. Transprenis la gvidadon Dorin PACIOGLU por kelka tempo. Ne daŭris longe, kaj aktiviĝis REFA sub la energia prezidanteco de Mihai STEFAN kun forta subteno de la tiama ĝen. dir. de la direkcio Braşov, dipl. inĝ. I. V. LEANCU. Komence 4 lokaj grupoj, dum malmultaj jaroj aldoniĝis novaj.

Ne daŭris longe, ĝis la rumana fervojo CFR fariĝis membro de FISAIC post konsila surloka helpado de hon. prez. GIESSNER, kiu ankaŭ kunorganizis fondon de pentrista branĉo kaj ĉeestis en fondo de filatelista branĉo. Gvidadon de la FISAIC-sekcio transprenis I. V. LEANCU. ĉiujare okazis jarkunvenoj en diversaj urboj, en kiuj kutime ĉeestis altranguoj de CFR. En 1998 REFA havis 500 membrojn, inter ili relative multe da gejunuloj. En 1997 helpe de ĝen. dir. LEANCU trajnparo inter Bucuresti kaj Sibiu rivevis la nomon *Esperanto*. Fortaj rumanaj grupoj partoprenis en la IFK-oj 1996 - 1998. Sorin PORUPKA ekde 1995 administras la Korespondan Servon de IFEF.

*M. Fedorowicz*

*M. Stefan*

*S. Porupka*

## **Slovakia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj (SAFE)**

Necesas menci, ke komence de la okdekaj jaroj la tiama IFEF-prezidanto GIESSNER klopodis starigi slovakon fervojistan asocion, kio tamen fiaskis pro la IFEF-statuto kaj kontraŭaj leĝoj de Z'SFR. Poste ŝanĝita statuto donis eblecon por havi du sekciojn de unu asocio en unu ŝtato.

La 10an de junio 1989 oni fondis en Z'ilina (Z'ilina) Fervojistan Sekcion de Slovakia Esperanto-Asocio. Ĝin akceptis IFEF kiel sekcion slovakon en IFK Hamar 1990. Komuna reprezentanto de la ĉeĥa kaj slovakaj sekcioj estis J. TOMÍŠEK. Post disfalo de Z'SFR IFEF aprobis la slovakon sekcion kiel memstaran landan asocion en IFK Cervia 1993. De post majo 1995 la asocio laŭleĝe ekzistas sub la nomo Slovakia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj kun 25 membroj (20 IFEF).

En la estraro de FS SEA dekomence agis ing. Magdaléna FEIFIČOVÁ kiel prezidantino. En terminara komisiono krom FEIFIČOVÁ laboris d-rino Angelina SYCHROVÁ, poste Lucia FEDOROVÁ. Ekde 1995 estraro de SAFE estas prezidantino M. FEIFIČOVÁ, vicprezidantino inĝ. Lucia FEDOROVÁ kaj sekretariino inĝ. Anna HLATAVÁ.

Ĝis divido de la ĉeĥoslovakaj fervojoj en ties horaro troviĝis klarigoj en Esperanto.

Post unujara paŭzo SAFE sukcesis denove aperigi la klarigojn en la horaro de Z'SR. En la halo de stacidomo Z'ilina senkoste troviĝas montrokesto por Esperanto-informoj. Raportoj kaj artikoloj pri okazintaĵoj de Esperanto-fervojistoj, same tekstoj de fakprelegoj ofte aperas en diversaj fakaj revuoj.

La utilecon de la lingvo Esperanto la asocio pruvis per fakaj prelegoj en la Trafika Altlernejo kaj Trafika Esplorinstituto en Z'ilina. Dum IFEF-kongresoj SAFE ofte kontribuis per prelegetoj al *Aktualaĵoj*. Dum IFK Pécs 1995 SAFE transdonis al FK de IFEF slovakon version de la Terminaro surbaze de UIC LG IV. Menciindaj estas sukcesaj klopodoj de SAFE starigi bonajn rilatojn al la fervojo kaj al la landa sekcio de FISAIC. Ties reprezentanto ĉeestis dum la tuta IFK Aalborg.

M. FEIFICOVA peris kontaktojn al konservatorio, popola ensemblo kaj ĥoro kaj al studio, tiel ke povis esti produktataj muzikkasedoj kaj KD kun tradukitaj kantoj. Same FEIFICOVA poste helpis en produktado de MK kun operetaj kantoj, prezentitaj de ĉeĥaj gesolistoj. La tradukojn faris J. GIESSNER (DE).

Kelkfoje SAFE kunlaboris en aranĝo de *Turismaj Tagoj* en la regiono de Z'ilina kun varia programo. Post la 43a IFK Olomouc SAFE organizis postkongreson en Z'ilina kun elstara programo folkloro, muzika kaj ekskursa. Simile sukcesis la 33a IFES 1992 en Vrátna-valo.

En 1997 SAFE kuraĝis inviti la 49an IFEF-kongreson al Košice sub gvidado de M. FEIFICOVA kaj aŭspicio de la iama ministro de transporto A. REZEC. La kongreso donis multajn kulminojn same kiel la postkongreso en Altaj

*A. Hlatavá, M. Fedorová, M. Feifičová*

Tatroj. Radioamatora stacio havis ĉirkaŭ mil tutmondajn kontaktojn. Aĉeteblaj estis specialaj poŝtkartoj kun kongresa motivo. De post tiu IFK en la pavimo apud la katedralo de Košice troviĝas tabuleto kun teksto: *Fervojista Esperanto-Kongreso majo 1997*.

En 1998 M. FEIFIĈOVÁ fariĝis anstataŭantino de la ĉefkomitatano.

## Slovenio

Sub gvidado de J. MIRKOVIĈ Slovenio aliĝis kiel landa asocio al IFEF en la IFK Cervia 1993.

## Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF)

Dum la tuta periodo gvidis prezidantino Gertrud EGGENBERGER kun sekr. O. WALDER (ĝis 1987), poste E. GLÄTTLI. Li ankaŭ estis komitatano, kunlaboris per multaj fakprelegoj. EGGENBERGER redaktis la landan organon Svisa Fervojisto. Ambaŭ estis delegitoj de la svisa FISAIC-sekcio.

**1984** SAEF ofertis sonbendan kurson kaj lanĉis varbkampanjon pere de 2.000 leteroj al fervojistoj en diversaj lokoj. Rezulto: *24 amikoj de Esperanto*.

**1988** Ekspozicio pri Esperanto en la kleriga Centro de la Fervojo Löwenberg.

**1995** La 25an de marto SAEF festis sian 70-jaran ekzistadon.

**1997** Okaze de Jubilea aranĝo de la FISAIC-sekcio granda ekspozicio en Olten. SAEF partoprenis per Esperanto-stando dum du semajnoj.

**1998:** Okazis la 30a lingvoperfektiga ĜERI-aranĝo (Ĝoja Esperanto-Rondo Instruiteca).

*G. Eggenberger*

## Bibliografio de Fervojfakaj Kajeroj n-roj 1 ĝis 7

1	Ek al seneraraj fervojaj tekstoj	L. Sekereš	YU
	Distingi kvaliton en la rilato de nocio kaj nomo	J. Werner	CZ
	Kio estas fervojo?	d-ro H. Hoffmann	DE
	Pola elektro-manovra lokomotivo EJM-10J	Fortunski	PL
2	Funkcio kaj servoj de okcidentaj fervojoj	J. Giessner	DE
	Ankoraŭfoje: Kio estas fervojo?	d-ro H. Hoffmann	DE
	La S-Fervojo de Zürich	E. Glättli	CH
	Rumanaj Fervojoj, turnplato de Eŭropo	d-ro I. Teresneu M. Stefan	RO
	Ne ĉiu vagono taŭgas	d-ro Wenkel (trad. B. Ehrlich)	DE
	Interesaj komplikajoj en difinlaboro	d-ro H. Hoffmann	DE
3	Masmezurilo en ranĝostacioj	L. Kovár	CZ
	Trafika faklerneja sistemo en Ĉeĥa Respubliko (unua parto - altlernejo)	Z. Polák	CZ
	Sekurigado de traknivelaj pasejoj	H. Hauge	DK

	Nova metodologio por kontrolo kaj diagnostiko de injekta mekanismo de la dizelmotoroj 12LDA28 kaj 6LDA28 sen demuntode sur motoro	J. Bizduña (trad.E.Tudorache + I.Sirbu)	RO
	La feruta koridoro tra Svislando	E. Glättli	CH
	Pri la terminoj »streno» kaj »streniĝo» en la terminaro de IFEF	J. Werner	CZ
	Iom pri la tunelo sub la Maniko	J. Giessner	DE
	Ĉu la fervojo estas bruema?	J. Giessner	DE
	Restukturado de la Ĉeĥa Fervojo	Z. Polák	CZ
	ZUB - la aŭtomata trajnbremssistemo ĉe la S-Fervojo en Zürich	E. Glättli	CH
4	Novaj S-trajnoj (laŭ "DSB Nye S-tog")	trad. E. H. Olsen	DK
	Horaro	S. David	CZ
	Sinergiaj efektoj de la integriĝo de la societoj Intercontainer kaj Interfrigo	G. Srediĉ	YU
	La vojo de la fervoja Esperanto-Terminaro ĝis 1995	J. Giessner	DE
	Malaperas la "fluganta" rado - Modernigo de emblemoj de eŭropaj fervojoj	G. Srediĉ	YU
5	Automataj biletsistemoj - plia evoluo. Elirpunkto en la sistemo SCANPOINT	J. Niemann	DK
	Kvar Brunel-distingoj por la Svisaj Federaciaj Fervojoj (SFF)	E. Glättli	CH
	Ambiciaj energio-ŝparplanoj de la Germana Fervojo DB	J. Giessner	DE
	Purigado, lavado kaj desinfektado de varvagonoj	G. Srediĉ	YU
	Kelkaj pensoj pri la interrilatoj de geometrio kaj movadaj karakterizajoj	d-ro J. Halász	HU
	Novaĵoj pri la eŭropaj grandrapidaj linioj	J. Giessner	DE
	Amasa konstruado de fervojaj tuneloj	G. Srediĉ	YU
6	Aŭdaca anstataŭigo de du unutrakaj fervojpontoj el fero per dutraka arka betonponto	E. Glättli	CH
	Fervoja tunelo sub Granda Belto	DEFA-skipo	DK
	Fortoj efikantaj al fervoja surkonstruaĵo	d-ro J. Halász	HU
	Rulantaj elektro-centraloj de la SFF	E. Glättli	CH
	Brunel-distingoj al Danaj Ŝtatformoj (DSB)	J. Niemann	DK
7	Modernaj informistemoj por vojaĝantoj	L. Kovár'	CZ
	«Transrapid» kaj aliaj aktualaĵoj	J. Giessner	DE
	La plej nova hungara fervojlinio estas projektata	d-ro J. Halász	HU
	Grandrapidaj fervojaj linioj en Balkanio	G. Srediĉ	YU

## Organiza skemo pri la Internacia Fervojista Esperanto-Movado

	IFEF	
	Estraro (gvidinstanco)	
	prezidanto, vicprezidanto, sekretario, kasisto, redaktoro	Federacia Organo
	Komitato (decida instanco)	
	komitatanoj delegitaj de la landaj asocioj - unu el ili estas ĉefkomitatano	
Faka Komisiono	Koresponda Servo	Komitatano A de UEA

Terminara Sekcio

Fake Aplika Sekcio

Terminara Kuriero

### Membrokategorioj

Asociaj Membroj de la aliĝintaj landaj asocioj (24)	Individuaj Membroj	Honoraj Membroj	Honoraj Prezidantoj	Membroj de la Honora Patrona Komitato
--	-----------------------	-----------------	------------------------	---

#### FISAIC

20 landaj IFEF-asocioj estas  
membroj de la Internacia Federacio  
de Kulturflegantaj Fervojistoj

#### UEA

IFEF estas Aliĝinta Asocio de  
Universala Esperanto-Asocio

#### SAT

IFEF estas subtenanta membro de  
Sennacieca Asocio Tutmonda

#### IEMW

IFEF kunlaboras kun la Internacia  
Esperanto-Muzeo Vieno